

HORIZONTO

I-a JARO N-o 6
NOV. - DEC. 1976

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



Don Quijote
konsilas al
Sancho Panza

PENSOJ DE ZAMENHOF

OKAZE DE LA DATREVENO DE LIA NASKIĜO

DEMANDITE

INICADO EN LA GROTO

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino

Inés Gastón

Redakta Komitato

Fernando de Diego

Juan Régulo

Jean Thierry

Red. kaj Adm.

Inés Gastón

P.º Marina Moreno, 35

Telf. (976) 22.05.21

Zaragoza-1 (Hispanujo)

Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj

Dumonata revuo

Presita en Zaragoza

ĉe "Tipografía C. Boloix"

str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8

Leĝa Depono Z-133-76

N.º 6 - Nov. - Dec. - 1976

ENHAVO

PENSOJ DE ZAMENHOF - OKAZE DE LA DATREVENO DE LIA NASKIGO (el Originala Verkaro)

TAGO DE ZAMENHOF - TAGO DE LA LIBRO EN ESPERANTO
15-12-1976 (Inés Gastón)

Mia amiko la libro (M. Sancho Izquierdo)
LA ANTAŬJUGOJ (Jean Thierry)

LOUISIANA (H.V.R.)

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas (Ivo Lapenna)

EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAJOJ

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ)

Internacia Konferenco de ILEI en San Marino

EL NIAJ AGADGRUPOJ

Danlando

MALLONGE

BELETRO

Balado (K. Kalocsay)

Demandite (Edwin de Kock)

Don Quijote de la Mancha en Esperanto (F. de Diego)

Ĉu ankoraŭ Floraj Ludoj? (G. Mora i Arana)

Inicado en la Groto (Bernard Golden)

SUKCESOJ EN BRITUJO

Informas (Ian Fantom)

JE MEMORO (I. Dratwer)

KION VI NE LEGOS ALILOKE

Letero al Redaktoro de IIS. (Ivo Lapenna)

TRA LA ESPERANTO GAZETARO

LIBROJ SUB LA LUPEO

Recenzas (G. Mora i Arana)

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Administracio: Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo (Jarabono 500 Ptoj.), aŭ la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:

Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.

Britujo:

Geoffrey King, 12 Elmer Close, ENFIELD Middx. EN2 7EZ. Pĉk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:

Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK-2700 BRØNSHØJ. Bank-konto, 354-800468, Bikuben Jernbanalle 34, Vanløse. Jarabono: 60,— D Kr.

Francujo:

André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle, F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:

Heinrich Müller, Mommsenstr. 5, D-3 HANNOVER. Jarabono 24,— DM.

Grekujo:

K. G. Eliopoulos, 130 El. Venizelos Ave., NEA SMIRNI—Attiki—. Bank-konto Nro. 040-753362-40, Nacia Banko de Greklando Eolu-str. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH TIKVA. Pĉk. Bank Hadoar, 4-45854-8. Jarabono: 70 izr. liroj.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO, Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— \$.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 17 rue St. Laurent, LORENTZWEILER. Konto N.º 5603/6196-3, CEE (Caisse d'Épargne de l'Etat). Jarabono: 380,— luksemburgaj frankoj.

Nederlando:

Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat, 172, HAGO 2011, Poŝtkonto 162626. Jarabono: 25 Gld.

Rumanujo:

Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502 R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.



PENSOJ DE ZAMENHOF - OKAZE DE LA DATREVENO DE LIA NASKIĜO

“Kion ajn vi devos fari, prezentu al vi de nun ĉiam, ke la iniciatoro de la lingvo jam ne ekzistas, ke ekzistas nur la lingvo mem kaj ĝia popolo (la esperantistoj). La nuna vortaro de nia lingvo estas multege pli riĉa ol la vortaro de ĉia juna, ankoraŭ ne sufiĉe potenca popolo; sekve se en tiuj lingvoj rapida riĉigado de la lingvo per fortoj komunaj iras tre facile kaj rapide, des pli facile ĝi iros en nia lingvo.” (*Originala Verkaro*, p. 217.)

“La evoluado de la lingvo fariĝos plej kredeble nur per tiu sama natura vojo, per kiu ĝi fariĝis en ĉiu alia lingvo, t. e. per la senrompa vojo de neologismoj kaj arĥaismoj.” (*Originala Verkaro*, p. 399.)

“Vi diras, ke la aperado de novaj vortoj faras la lingvon pli malfacile ellernebla. Sed kial? Ili ja tute ne elpuŝas la antaŭajn vortojn kaj ne ŝanĝas en io la ĝisnunajn principojn de la esperanta vortfarado. Ili ja servas nur por la okazoj de efektiva *bezono* kaj garantias kontraŭ la Babilona konfuzo, kiu aperus, se en okazoj de bezono ĉiuj aparte kreus vortojn *malegalajn*: sed kiam oni tiujn vortojn ne bezonus, oni ilin ne uzas.” (*Originala Verkaro*, p. 429.)

“Ĉiu, kiu legis la antaŭparolon de la “Fundamento de Esperanto”, scias tre bone, ke ĝi ne sole ne prezentas ian baron kontraŭ la evolucio de la lingvo, sed kontraŭe, ĝi donas al la evolucio tian grandegan liberecon, kiun neniu alia lingvo jam posedis eĉ parte... Se la esperantistoj ĝis nun tre malmulte faris uzon de tiu granda libereco, kiun la Fundamento al ili donas, ĝi ne estas kulpo de la Fundamento, sed ĝi venas de tio, ke la esperantistoj komprenas tre bone, ke lingvo, kiu devas tratabi al sia la vojon ne per ia potenca dekreto, sed per laborado de amasoj, povas disvolviĝi nur per tre singarda vojo de natura *evolucio*, sed ĝi tuj mortus, se oni volus ĝin disvolvi per kontraŭnatura kaj danĝeriga vojo de *revolucio*.” (*Originala Verkaro*, p. 446.)

TAGO DE ZAMENHOF.

TAGO DE LA LIBRO EN ESPERANTO

15 - 12 - 1976

Dum jarcentoj, la lingva problemo priokupis aron da filozofoj, filologoj, sciencistoj kaj pedagogoj. Neniu antaŭ Zamenhof sukcesis solvi la problemon, ĉefe, ĉar neniu el ili sukcesis inokuli animon al la lingvo, tiun senton de humaneca internaciismo, kiu estas la spirito de Esperanto, kio faras de ĝi vere vivantan lingvon.

Pasis la jaroj... kaj Esperanto ĉiam en kreskanta evoluo, montris al la mondo sian valoron en literatura kaj scienca kampoj. Por ĝia kresko kaj tiu de la literaturo, multe helpis la idealista motivo, kiu inspiris Dron. Zamenhof kaj liajn amikojn; ĝin oni nomis interna ideo de Esperanto aŭ Esperantismo, kiu estas la animo de la lingvo.

La 15-an de decembro, en ĉiuj kontinentoj, centoj da Esperanto-Grupoj festos la "Tagon de Zamenhof", la esperantistoj aranĝos "*fratajn kunvenojn*" por festi la 117-a datrevenon de la naskiĝo de la Majstro... sed, ĉu ili lernis kaj sentas kune kun la lingvo, la veran senton de Esperanto, aŭ ĉu ili nur lernis la vortojn?

Prof. Delfi Dalmau skribis: "Sen La Espero kaj La Vojo, malforta estus Esperanto. Sen animo ne estas lingvo. Certe malsukcesas en Esperantujo ne Esperanto sed malbonaj esperantistoj".

Kaj mi aldonas: Tiu frazo ne rilatas al tiuj homoj, kiuj antaŭ la reganta materialismo, nur vidas en Esperanto la ilon per kiu oni povas atingi la celon signitan de sia egoismo kaj vantemo. Ĝi rilatas, (kaj mi uzos vortojn de Prof. Dalmau), "al tiuj esperantistoj ne sufiĉe sentemaj al la interna ideo, al la spirito de Esperanto, al la profunda kaŭzo ke nia lingvo longe vivas...". Kaj, mi petas ilin, ke almenaŭ en tiu tago, ili tralegu ambaŭ poemojn, "La Espero" kaj "La Vojo", kaj meditu iomete, ĉu ili povas sin nomi Zamenhofaj esperantistoj?!

Inés Gastón

MIA AMIKO LA LIBRO

La libro estas mia amiko. Amiko sub multaj formoj, sed amiko ĉiam. Kelkfoje ĝi min instruas; kelkfoje ĝi min distras, same kiel la amiko el karno kaj ostoj, kies konversacio tiel multe plaĉas; kelkfoje ĝi min ravas per la ritmo de sia poezio, kiel sorĉa lulkanto... Jes, ja, mi scias: kelkfoje la libro ankaŭ ŝokas kaj skandalas, (eĉ se ĝi sin vestas per la tiel nomata "nova rakont-arto") kiel la persono, kiu asertas esti nia amiko kaj nin tentas, kaj kiun ni devas ignori malgraŭ lia surfaca simpatio.

La libroj povas esti sengarnaj, en modesta bindo, kiel la amikoj simplaj, kies humila aspekto igas ilin singenaj, ĉar ili pensas, ke ili vidiĝas en malsupera situacio rilate al la ceteraj personoj. Ekzistas ankaŭ libroj luksaj, kiel la amikoj al kiuj plaĉas porti ĉiam la plej lastmodan veston. Kaj libroj malnovaj, plenaj de rememoroj, similaj al la libro menciita de Menéndez y Pelayo en ties "Epistolo al Horacio": *Mi konservas kun amo libron oldan...* Jes, kun amo, ĉar temas pri malnova amiko, kaj amikoj tiaj ne havas prezon. Kaj ekzistas ankaŭ freŝaj libroj, kies prozo aŭ poezio igas nin elvoki la nunan junularon.

Kelkaj timis, ke la aktualaj rimedoj de informado sukcesus elimini la librojn el nia vivo. Sed, ne. Unue, ĉar la libroj estas diskonigiloj malsamaj je la aliaj diversaj sistemoj de sciigado, kaj kiam oni transplantas la enhavon de libro al iu ajn el la novaj sistemoj, la adapto pruvigas nekontentiga. Oni memoru, por ekzemplo, pri la verkoj pensitaj kaj skribitaj por la teatro, kaj pri iliaj versioj filmaj aŭ televidaj. Kaj pri la romanoj, kies versioj vidiĝas poĉapitre en la televido kaj kiuj konservas el la originaloj apenaŭ nur la intrigon.

Sed, krome, romano tiel prezentata en la televido ne povas esti amiko nia; same kiel ne povas esti nia amiko la persono kun kiu ni okaze interŝanĝas kelkajn vortojn sur la strato, kaj kiun ni renkontos poste neniam. Kontraŭe, la libro kuŝas ĉe la atingo de nia mano kaj ni povas laŭvole rekontakti ĝin, meti ĝin sub la brakon, same kiel oni metas la brakon de amiko sub la nian, kaj promeni kun ĝi eble por mediti, eble por revii...

Miguel Sancho Izquierdo

ĜOJAN KRISTNASKON - FELIĈAN NOVAN JARON

LA ANTAŬJUĜOJ!

En ĉi tiu serio de artikoloj estos prilumitaj la plej gravaj el tiuj, kiuj bremsas la normalan disvastiĝadon de la lingvo.

PRI LA LINGVO KIEL ESPRIMILO

(daŭrigo)

Nu aliaj misfamigantoj iras ankoraŭ pli malproksimen: Esperanto estas uzebla eĉ ne kiel porscienca lingvo! En Esperanto ekzistas nek scienca literaturo, nek sciencaj terminologioj; kaj neniu scienculo uzas Esperanton. Esperanto ne havas ekzemple la flekseblecon kaj precizecon de la germana lingvo, nek la grandan disvastiĝon de la sciencaj lingvoj tradiciaj.

Ja en 1907 la sama Remy de Gourmont jam deklaris: *“Pri la ebleco mem de tiu lingvo el scienca vidpunkto mi nenion diras, ĉar mi havus tro multe por diri. Iu scienco... kiu en lingvo mortinta aŭ nurŝajna disvolvas siajn laborojn kaj konkludojn, kondamnas sin havi influon nur preskaŭ nulan sur la ide-iradon.”* (Tiel!)

Estus tro longe nun elnomi ĉiujn evidentajn pruvojn pri uzo de la lingvo sur la scienca kampo: ni limigu nin je du specoj de faktoj.

1.^o Ekde 1924 rezolucio de la Scienca Akademio de Francio — subskribita de la 40 membroj, inter kiuj troviĝas la nomoj E. Borel, A. Cotton, generalo Sebert, i. a. — substrekis la konvinkon, ke la Lingvo Internacia *“havas grandegajn konsekvencojn el la vidpunkto de la scienca progreso kaj de ĝiaj aplikoj”*.

Al tio respondis en 1950 la Scienca Konsilio de Japanio per rezolucio, kiu insistis interalie pri la deziro de ĉiuj japanaj scienculoj, ke iliaj komunikaĵoj kiel ĉiuj de la aliaj estu same facile konataj en ĉiuj partoj de la mondo; kaj tiucele okdek kvin japanaj scienculoj, el ili sesdek ok universitataj profesoroj, sin devontigis uzi Esperanton por almenaŭ unu komunikaĵo jare.

Tial en 1962 la 1-a Internacia Konferenco pri la lingva demando en la sciencoj okazis en Kopenhago. Kaj nuntempe Esperanto estas uzata lingvo eĉ per komputeroj kiel ekzemple en Saarbrücken.

2.^o La sciencaj terminologioj en Esperanto estis jam en 1964 cent dudek sep por kvindek sciencaj branĉoj, dum en 1949 ili estis nur cent ses por kvardek tri fakoj. Tiel kvankam malrapida la progreso estas konstanta... La lastaperinta verko en 1974 estas la Internacia Komercaekonomika Vortaro de F. Munniksma, kiu estis kompilita en naŭ lingvoj: esperanta, angla, franca, germana, hispana, itala, nederlanda, portugala kaj sveda; notinde, ke la difinoj ekzistas nur en Esperanto kaj en la angla. La escepta avantaĝo de tiu vortaro estas jena: ĉiu el la lingvoj estis atente ekzamenita de personoj, kiuj ĝin posedis denaske; kio donas al la vortaro apartan valoron kaj eble klarigas, ke en unu jaro la unua eldono troviĝis elĉerpita.

—(o)—

Sed la plej malica antaŭjuĝo estas tiu, kiu — rekonante la ekziston de la lingvo — steriligas ĝian estontecon. Eĉ se Esperanto post kelkaj jarcentoj sukcesus enradikiĝi, oni sentencotone koncedos al vi, kun la tempo ĝi dissplitiĝus en dialektojn, ĉar nepre ĉiuj popoloj ĝin prononcas malsammaniere kaj iom post iom la esperantistoj havos malfacilaĵojn por kompreni unu la alian. Se Esperanto pretendas esti la revenĝo al Babel, ne estas malpli vere, ke de ĉiuj tempoj ĉiu komuna lingvo estis destinita por diseriĝado!

Jen sendube argumento la plej negativa kaj la malplej pravigebla, kiun oni povas formuli! Ĝi neas apriorie la eblon de ĉia komuna lingvo: oni ne vidas efektive, kial ĉe tiaj kondiĉoj de antaŭdirado (aŭ malbenado!) unu lingvo estus pli favorata ol la alia; sed krome ĝin kontraŭdiras jam la ekzisto de komunaj naciaj lingvoj apud la regionaj; kaj ĝi enhavas la tute hazardan karakteron de profetaĵo; kiun profetaĵon cetere la faktoj jam de naŭdek jaroj akumulitaj ĉiutage pli certe malkonfirmas!

La sorto de Babelo fatale trudiĝus, se Esperanto emus elpuŝi ĉiujn aliajn lingvojn, sed neniam estas tiel, ĉar ĝuste Esperanto fontas el la aliaj lingvoj kaj laŭdifine estas komuna lingvo bone estiĝebla nur en du aŭ tri-lingva sistemo, kiu do eventuale lasas lokon al regiona lingvo sed minimume almenaŭ al unu nacia lingvo; kaj ĝuste tio ĝin protektas kontraŭ la korodado de la substratoj, ĉar tiel ĝi konservas antaŭ ĉio staton de klereca lingvo.

Ciel ajn Esperanto estas el ĉiuj lingvoj tiu, kies strukturo per sia simpleco kaj karaktero logika (aŭ pli ekzakte analogia) estas aparte la plej kapabla defendi sin kontraŭ la influo de la aliaj lingvoj. La simpleco de ĝiaj vokaloj, la neteco de ĝiaj konsonantoj kaj la reguleco de ĝia akcento ebligas interalie ensorbi flekseble ĉiujn fonemajn variojn sen ia risko igi malfacila aŭ malklara la kompreniĝon. Kio eksplikas, ke la diversaj varioj (eventuale renkontitaj) prezentas ne multe pli da malfacilaĵoj por eldiri klareco, ol ekzemple la malsamaj provincaj prononc-manieroj en iu ajn nacia lingvo. Tion atestas la bendo registrita de homoj el kvar nacioj por la ASIMIL-kurso “ESPÉRANTO SEN PENO”. Kiam enestas nur kvin vokaloj, se vi faras etan varieron pri unu el ili,

TAGO DE ZAMENHOF, TAGO DE LA LIBRO EN ESPERANTO 15 - 12 - 1976

Dum jarcentoj, la lingva problemo priokupis aron da filozofoj, filologoj, sciencistoj kaj pedagogoj. Neniu antaŭ Zamenhof sukcesis solvi la problemon, ĉefe, ĉar neniu el ili sukcesis inokuli animon al la lingvo, tiun senton de humaneca internaciismo, kiu estas la spirito de Esperanto, kio faras de ĝi vere vivantan lingvon.

Pasis la jaroj... kaj Esperanto ĉiam en kreskanta evoluo, montris al la mondo sian valoron en literatura kaj scienca kampoj. Por ĝia kresko kaj tiu de la literaturo, multe helpis la idealista motivo, kiu inspiris Dron. Zamenhof kaj liajn amikojn; ĝin oni nomis interna ideo de Esperanto aŭ Esperantismo, kiu estas la animo de la lingvo.

La 15-an de decembro, en ĉiuj kontinentoj, centoj da Esperanto-Grupoj festos la "Tagon de Zamenhof", la esperantistoj aranĝos "*fratajn kunvenojn*" por festi la 117-a datrevenon de la naskiĝo de la Majstro... sed, ĉu ili lernis kaj sentas kune kun la lingvo, la veran sencion de Esperanto, aŭ ĉu ili nur lernis la vortojn?

Prof. Delfi Dalmau skribis: "Sen La Espero kaj La Vojo, malforta estus Esperanto. Sen animo ne estas lingvo. Certe malsukcesas en Esperantujo ne Esperanto sed malbonaj esperantistoj".

Kaj mi aldonas: Tiu frazo ne rilatas al tiuj homoj, kiuj antaŭ la reganta materialismo, nur vidas en Esperanto la ilon per kiu oni povas atingi la celon signitan de sia egoismo kaj vanismo. Ĝi rilatas, (kaj mi uzos vortojn de Prof. Dalmau), "al tiuj esperantistoj ne sufiĉe sentemaj al la interna ideo, al la spirito de Esperanto, al la profunda kaŭzo ke nia lingvo longe vivas...". Kaj, mi petas ilin, ke almenaŭ en tiu tago, ili tralegu ambaŭ poemojn, "La Espero" kaj "La Vojo", kaj meditu iomete, ĉu ili povas sin nomi Zamenhofaj esperantistoj?!

Inés Gastón

MIA AMIKO LA LIBRO

La libro estas mia amiko. Amiko sub multaj formoj, sed amiko ĉiam. Kelkfoje ĝi min instruas; kelkfoje ĝi min distras, same kiel la amiko el karno kaj ostoj, kies konversacio tiel multe plaĉas; kelkfoje ĝi min ravas per la ritmo de sia poezio, kiel sorĉa lulkanto... Jes, ja, mi scias: kelkfoje la libro ankaŭ ŝokas kaj skandalas, (eĉ se ĝi sin vestas per la tiel nomata "nova rakont-arto") kiel la persono, kiu asertas esti nia amiko kaj nin tentas, kaj kiun ni devas ignori malgraŭ lia surfaca simpatio.

La libroj povas esti sengarnaj, en modesta bindo, kiel la amikoj simplaj, kies humila aspekto igas ilin singenaj, ĉar ili pensas, ke ili vidiĝas en malsupera situacio rilate al la ceteraj personoj. Ekzistas ankaŭ libroj luksaj, kiel la amikoj al kiuj plaĉas porti ĉiam la plej lastmodan veston. Kaj libroj malnovaj, plenaj de rememoroj, similaj al la libro menciita de Menéndez y Pelayo en ties "Epistolo al Horacio": *Mi konservas kun amo libron oldan*... Jes, kun amo, ĉar temas pri malnova amiko, kaj amikoj tiaj ne havas prezon. Kaj ekzistas ankaŭ freŝaj libroj, kies prozo aŭ poezio igas nin elvoki la nunan junularon.

Kelkaj timis, ke la aktualaj rimedoj de informado sukcesus elimini la librojn el nia vivo. Sed, ne. Unue, ĉar la libroj estas diskonigiloj malsamaj je la aliaj diversaj sistemoj de sciigado, kaj kiam oni transplantas la enhavon de libro al iu ajn el la novaj sistemoj, la adapto pruviĝas nekontentiga. Oni memoru, por ekzemplo, pri la verkoj pensitaj kaj skribitaj por la teatro, kaj pri iliaj versioj filmaj aŭ televidaj. Kaj pri la romanoj, kies versioj vidiĝas poĉapitre en la televido kaj kiuj konservas el la originaloj apenaŭ nur la intrigon.

Sed, krome, romano tiel prezentata en la televido ne povas esti amiko nia; same kiel ne povas esti nia amiko la persono kun kiu ni okaze interŝanĝas kelkajn vortojn sur la strato, kaj kiun ni renkontos poste neniam. Kontraŭe, la libro kuŝas ĉe la atingo de nia mano kaj ni povas laŭvole rekontakti ĝin, meti ĝin sub la brakon, same kiel oni metas la brakon de amiko sub la nian, kaj promeni kun ĝi eble por mediti, eble por revii...

Miguel Sancho Izquierdo

ĜOJAN KRISTNASKON - FELIĈAN NOVAN JARON

LA ANTAŬJUĜOJ!

En ĉi tiu serio de artikoloj estos prilumitaj la plej gravaj el tiuj, kiuj bremsas la normalan disvastiĝadon de la lingvo.

PRI LA LINGVO KIEL ESPRIMILO

(daŭrigo)

Nu aliaj misfamigantoj iras ankoraŭ pli malproksimen: Esperanto estas uzebla eĉ ne kiel porscienca lingvo! En Esperanto ekzistas nek scienca literaturo, nek sciencaj terminologioj; kaj neniu scienculo uzas Esperanton. Esperanto ne havas ekzemple la flekseblecon kaj precizecon de la germana lingvo, nek la grandan disvastiĝon de la sciencaj lingvoj tradiciaj.

Ja en 1907 la sama Remy de Gourmont jam deklaris: *"Pri la ebleco mem de tiu lingvo el scienca vidpunkto mi nenion diros, ĉar mi havus tro multe por diri. Iu scienco... kiu en lingvo mortinta aŭ nurŝajna disvolvas siajn laborojn kaj konkludojn, kondamnas sin havi influon nur preskaŭ nulan sur la ide-iradon."* (Tiel!)

Estus tro longe nun elnomi ĉiujn evidentajn pruvojn pri uzo de la lingvo sur la scienca kampo: ni limigu nin je du specoj de faktoj.

1.^o Ekde 1924 rezolucio de la Scienca Akademio de Francio — subskribita de la 40 membroj, inter kiuj troviĝas la nomoj E. Borel, A. Cotton, generalo Sebert, i. a. — substrekkis la konvinkon, ke la Lingvo Internacia *"havas grandegajn konsekvencojn el la vidpunkto de la scienca progreso kaj de ĝiaj aplikoj"*.

Al tio respondis en 1950 la Scienca Konsilio de Japanio per rezolucio, kiu insistis interalie pri la deziro de ĉiuj japanaj scienculoj, ke iliaj komunikaĵoj kiel ĉiuj de la aliaj estu same facile konataj en ĉiuj partoj de la mondo; kaj tiucele okdek kvin japanaj scienculoj, el ili sesdek ok universitataj profesoroj, sin devontigis uzi Esperanton por almenaŭ unu komunikaĵo jare.

Tial en 1962 la 1-a Internacia Konferenco pri la lingva demando en la sciencoj okazis en Kopenhago. Kaj nuntempe Esperanto estas uzata lingvo eĉ per komputeroj kiel ekzemple en Saarbrücken.

2.^o La sciencaj terminologioj en Esperanto estis jam en 1964 cent dudek sep por kvindek sciencaj branĉoj, dum en 1949 ili estis nur cent ses por kvardek tri fakoj. Tiel kvankam malrapida la progreso estas konstanta... La lastaperinta verko en 1974 estas la Internacia Komercaekonomika Vortaro de F. Munniksma, kiu estis kompilita en naŭ lingvoj: esperanta, angla, franca, germana, hispana, itala, nederlanda, portugala kaj sveda; notinde, ke la difinoj ekzistas nur en Esperanto kaj en la angla. La escepta avantaĝo de tiu vortaro estas jena: ĉiu el la lingvoj estis atente ekzamenita de personoj, kiuj ĝin posedis denaske; kio donas al la vortaro apartan valoron kaj eble klarigas, ke en unu jaro la unua eldono troviĝis elĉerpita.

—o(o)—

Sed la plej malica antaŭjuĝo estas tiu, kiu — rekonante la ekziston de la lingvo — steriligas ĝian estontecon. Eĉ se Esperanto post kelkaj jarcentoj sukcesus enradikiĝi, oni sentencotone koncedos al vi, kun la tempo ĝi dissplitiĝus en dialektojn, ĉar nepre ĉiuj popoloj ĝin prononcas malsammaniere kaj iom post iom la esperantistoj havos malfacilaĵojn por kompreni unu la alian. Se Esperanto pretendas esti la revenĝo al Babel, ne estas malpli vere, ke de ĉiuj tempoj ĉiu komuna lingvo estis destinita por diserigado!

Jen sendube argumento la plej negativa kaj la malplej pravigebla, kiun oni povas formuli! Ĝi neas apriorie la eblon de ĉia komuna lingvo: oni ne vidas efektive, kial ĉe tiaj kondiĉoj de antaŭdirado (aŭ malbenado!) unu lingvo estus pli favorata ol la alia; sed krome ĝin kontraŭdiras jam la ekzisto de komunaj naciaj lingvoj apud la regionaj; kaj ĝi enhavas la tute hazardan karakteron de profetaĵo; kiun profetaĵojn cetere la faktoj jam de naŭdek jaroj akumultitaj ĉiutage pli certe malkonfirmas!

La sorto de Babelo fatale trudiĝus, se Esperanto emus elpuŝi ĉiujn aliajn lingvojn, sed neniom estas tiel, ĉar ĝuste Esperanto fontas el la aliaj lingvoj kaj laŭdifine estas komuna lingvo bone estiĝebla nur en du aŭ tri-lingva sistemo, kiu do eventuale lasas lokon al regiona lingvo sed minimume almenaŭ al unu nacia lingvo; kaj ĝuste tio ĝin protektas kontraŭ la korodado de la substratoj, ĉar tiel ĝi konservas antaŭ ĉio staton de klereca lingvo.

Ciel ajn Esperanto estas el ĉiuj lingvoj tiu, kies strukturo per sia simpleco kaj karaktero logika (aŭ pli ekzakte analogia) estas aparte la plej kapabla defendi sin kontraŭ la influo de la aliaj lingvoj. La simpleco de ĝiaj vokaloj, la neteco de ĝiaj konsonantoj kaj la reguleco de ĝia akcento ebligas interalie ensorbi flekseble ĉiujn fonemajn variojn sen ia risko igi malfacila aŭ malklara la kompreniĝon. Kio eksplikas, ke la diversaj varioj (eventuale renkontitaj) prezentas ne multe pli da malfacilaĵoj por eldira klareco, ol ekzemple la malsamaj provincaj prononc-manieroj en iu ajn nacia lingvo. Tion atestas la bendo registrita de homoj el kvar nacioj por la ASIMIL-kurso "ESPERANTO SEN PENO". Kiam enestas nur kvin vokaloj, se vi faras etan varieron pri unu el ili,

ĉi tiu fonetika modifeto ne malhelpas la rekonon de la vorto pere de la orelo; male ĝi donas varian riĉecon al la lingvo kiel en ĉiuj naciaj lingvoj. Sed kun tre nuancitaj vokalaj kaj vortoj fonetike reduktitaj je unu sola silabo kiel en la angla lingvo ĉia vario kuntrenas ĉen-konsekvencojn!

Krome Esperanto estas de la "aglutina" tipo; kio igas ĝian strukturon absolute fremda al la Eŭropaj lingvoj: — kiel skribis d-ro L. L. Zamenhof:


"Car (la propra strukturo de la lingvo) estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj, kaj al kutimiĝi al ĝi estas por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembrigon de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj."

Sed ĝuste tia karaktero konsistigas ĝian defendilon. La tro markitaj influoj de unu nacia lingvo ĉiam troviĝas iom post iom forĵetitaj kiel heterogenaj greftaĵoj, ĉar la lingvoj des pli miksiĝas, ju pli ili estas tro parencaj unu al la alia, kiel estis la kazo de la galla rilate al la latina kaj estas nun tiu de la latinidaj kaj ĝermanaj rilate al la angla.

Tial, kiel diris la franca poeto François Coppée: *"Esperanto protektos la naciajn lingvojn kontraŭ la reciproka interpenetrado, kiu ilin ĉiutage pli difektas."* Kiel montras la historio de la latina, la samon oni ne povus diri pri iu ajn nacia lingvo, kies uzado bazita nur sur kutimo etendiĝas kaj difektiĝas ekster la limojn de la regiono, kiu ĝin naskis!

(daŭrigota) J. T.

LOUISIANA



Tre proksime al la loko de la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, Altlernejo Krogerup en Humlebæk, unike situanta en parko inter la ŝoseo kaj la markola bordo, troviĝas la muzeo Louisiana, kiu transprenis la nomon de la kampara vilao, pli ol 100-jara, nun funkcianta kiel enireja pavilono de la muzeo.

Ĝin fondis ĝia direktoro Knud W. Jensen, unue kiel privatan entreprenon. Nun ĝi estas publika institucio posedata de la Louisiana-fonduso.

La muzeo estis malfermita en 1958, tiam por ekspozicii modernajn danajn artverkojn, sed pro posta alkonstruado de novaj pavilonoj (arkitektoj Jørgen Bo kaj Vilhelm Wohlert) kaj pliampleksigo de la kolektoj ĝi nun estas muzeo de tutmonda moderna arto kun reputacio ankaŭ ekster la limoj de Danlando.

En la muzeo estas krom la permanentaj kolektoj ankaŭ alternantaj ekspozicioj de verkoj el aliaj kolektoj kaj aliaj aktivecoj, ekzemple koncertoj.

Dum la konferenco okazos gvidata vizito al la muzeo.

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro Ivo Lapenna

N-ro 6

6 Konfidenca Dokumento pri la Agado en Montevideo

6.1 *Enkonduka rimarko.* — Pasis precize 22 jaroj ekde la 10-a de decembro 1954, kiam la Generala Konferenco de Unesko akceptis la konatan Rezolucion favore al Esperanto. La tuta februara n-ro de *Esperanto*, 1955, estis dediĉita al la Rezolucio kaj al la signifo de la decidoj de Unesko. En ĝi troviĝas ankaŭ artikolo pri la Unua Elmonro de la Universala Esperanto-Ekspozicio en Montevideo, kvin esence gravaj aldonoj lige kun la Konferenco, listo de dokumentoj de Unesko rilatantaj al Esperanto, kiel ankaŭ publika dankesprimado al ĉiuj multnombraj kunlaborintoj en 68 landoj kaj aliaj personoj, kiuj kontribuis al la sukceso. La samo estas prezentita kaj analizita, iom pli koncize kaj sen la aldonaj dokumentoj, en 22.3 de *Esperanto en Perspektivo* (en la plua teksto *EeP*). Ĉiu iom serioza interesiganto pri la historio de la Esperanto-Movado en la postmilita periodo ĝis Hamburgo (1974) kaj pri la aplikotaj metodoj por atingi pozitivajn rezultojn, devus atente studi tiujn dokumentajn materialojn.

Kvankam la agadoj de UEA ĉe UN kaj Unesko estis nur konsista parto de multflanka kaj ĉiudirekta aktivado de la Asocio surbaze de unueca konceptaro (v. Cap. 18, precipe 18.2 de *EeP*), tamen por multaj *Montevideo* farigis preskaŭ simbolo de tiu tuta spirito, kiu inspiris ĉiujn laborojn de la ĝishamburga UEA. Aludante al la nuna situacio en UEA, Giorgio Silfer skribis antaŭ nelonge en *Literatura Foiro*, ke “*se Montevideo efikis al la esperantistaro kaj literature kaj organize (krome Montevideo ne povis veni per si mem; ĝi ja signis la maturiĝon de plurjara fermento) — hodiaŭ ia Hamburgo signifas nenion por la E-literaturisto, nek iliaflanke oni stimulis per kulturaj proponoj al novaj perspektivoj*”; plue: “*...la senalternativa velko de la Montevidea spirito estas tumoro pli maligna ol la ĉiukaze respektinda demando 'kiamaniere plane financi la movadon?' (n-ro de junio/aŭgusto 1976, p-oj 8-9)*”.

Nun, post plenaj 22 jaroj, venis la tempo por publikigi plian dokumenton, kiu ĵetas aldonan lumon sur la agadon en Montevideo mem. Temas pri leteroj, kiujn la subskribinto sendadis el Montevideo al la tiama prezidanto de UEA, s-ro E. Malmgren, por regule informadi lin pri la evoluo de la afero. Kopiojn ricevadis ankaŭ f-ino Marianne Vermaas, en tiu tempo sekretariino de CED por Nederlando, kiu provizore ekloĝis en Londono (je propraj kostoj, kompreneble) por prizorgadi CED dum la foresto de la subskribinto en Montevideo. Laŭ mia peto, f-ino Vermaas faris elтираjajn el la menciitaj leteroj “pri la evoluo, streĉaj turniĝoj kaj pli ol drameca fina venko”, multobligis tiun historian materialon kaj sendis ĝin kiel absolute konfidencan jam en decembro 1954 al la plej sindonaj kaj fidindaj kunlaborantoj. En sia akompana noto ŝi skribis:

«Cie mi lasis la aŭtentikajn vortojn de D-ro Lapenna. Mi eligis el la leteroj nur tiujn frazojn aŭ alineojn, kiuj ne rekte koncernas la temon mem de la Peticio, por ke ne perdiĝu la fadeneto de la okazintaĵoj. Tial ne troviĝas ĉi tie la partoj pri la Konsulta Pozicio, la entuziasmaj ĉapitroj pri la Ekspozicio, la elkoraĵ vortoj pri la Montevideaj esperantistoj. Ilin oni certe legos aliloke.»

La tuta materialo ampleksis 24 dense tajpitajn paĝojn. Ĉi tie nun aperas la ĉefaj partoj. Kompreneble, ĉie mi konservis la aŭtentikajn vortojn kaj stilon. Oni konsideru, ke ĉiam la leteroj estis skribataj nokte post tre lacigaj tagoj, sub la plej freŝmemoraj impresoj. La subtitolojn, kiujn mi same konservas en la aŭtentika formo, siatempe aldonis f-ino Vermaas dum la kompilado. La sola nuna aldono estas la piednotoj kun koncizaj klarigoj pri personoj aŭ faktoj.

6.2 *La Dokumento.* — Jen, do la ĉefaj partoj de tiuj leteroj laŭ la kompilaĵo de f-ino Vermaas.

6.2.1 *La unuaj kontaktoj (el la let. de 06.11.1954).* — Mi aŭdis, ke hodiaŭ posttagmeze kaj morgaŭ devas alveturi la germana kaj franca delegacioj, kiuj ambaŭ loĝos en ĉi tiu sama hotelo. Mi esperas tuj kontakti la francan ministron pri edukado kaj la ĉefon de la Germana Delegacio. Mi ricevis informojn, ke voĉdonos por la rezolucio, krom la ŝtatoj, kiuj respondis favore al Unesko¹, ankaŭ Nederlando, Argentino, Brazilo. Mi, kompreneble, ne fidis ĝis mi vidis la finan rezulton, sed tamen tiuj informoj estas iom kuraĝigaj.

Hodiaŭ matene mi vizitis la episkopon de Montevideo. Li nomiĝas Barbieri kaj tio estas la nomo de familio, kun kiu mia familio estis en tre amikaj rilatoj en Dalmatio. Per tiu temo ni komencis la konversacion en la itala lingvo kaj montriĝis, ke li estas en tre malproksima familia rilato kun la dalmata familio. La konversacio daŭris du horojn kaj li montriĝis ege interesita pri nia afero kaj promesis ĉian helpon. Mi plue konservis kontakton kun la episkopo. Tiu aŭdienco estis utiliga.

6.2.2 *Delegacio post delegacio rifuzas proponi rezolucion (el letero de 16.11.1954).* — Mi parolis kun trideko da delegacioj. La rezulto estas, ke mi ankoraŭ ne havas delegacion, kiu proponos rezolucion². La sepa tago finiĝos la 19-an. Mi, do, havas je dispono ankoraŭ tri tagojn³. Hodiaŭ mi parolos kun Sommerfeld⁴, se mi iel povos kapti lin. Eble la Norvegoj faros la proponon. Se iu faros ĝin, mi estas preskaŭ certa, ke la plimulto

ĝin akceptos. Se eĉ la Norvegoj ne volos proponi, mi turnos min al la Angloj. Rifuzis proponi: Hindio, Indonezio, Filipinoj, Siamo, Laoso, Jordanio, Koreo, Libano, Italio (ankoraŭ diskutata la afero), Nederlando, Urugvajo (ankoraŭ diskutata), Aŭstralio (diskutata), por citi nur kelkajn. Ripetiĝas absolute la sama afero kiel en Parizo⁸.

6.2.3 *Neeble trovi la delegacion (el let. de 23.11.1954).* — Nia situacio estas malbonega. Ni havas multe da insistaj malamikoj, sed eĉ ne unu veran amikon. La sepa tago de la Konferenco forpasis kaj mi ne sukcesis trovi delegacion por proponi almenaŭ iom favoran rezolucion. Ne estas nun la momento por analizi la staton, sed mi povas diri, ke la aziaj delegacioj ĝenerale malfavoras nin, ĉar "ili devas lerni la anglan". Same la afrikaj. La grandaj potencoj estas kontraŭ pro la situacio de iliaj resp. lingvoj. La solaj ŝtatoj, kiuj povus nin helpi, estas la nordaj. Sed ili tute simple ne volas. Sommerfeld estas nia plej granda malamiko kaj faras ĉion por malhelpi miajn klopodojn. Same Ungaretti de la itala delegacio. La situacio estas multege pli malbona ol en Parizo, ĉar tie la delegacioj ne havis instrukciojn de siaj registaroj, dum ĉi tie aŭ ili fakte havas aŭ elturniĝas dirante, ke ili havas negativajn instrukciojn. Mi antaŭvidis ĉiujn ĉi malfacilaĵojn. Se niaj landaj asocioj kaj kunlaborantoj ne sukcesis en pli ol ses monatoj konvinki *siajn proprajn* registarojn proponi konkretan favoran rezolucion, kiamaniere mi sola ĉi tie, en tiu konfuzo kaj ĥaoso, kun ĉiuj tiuj komisionoj, subkomisionoj, komitatoj ktp., kun ĉiuj bankedoj akceptoj k. s. povus sukcesi konvinki 72 delegaciojn, en nuraj kelkaj tagoj, voĉdoni por ni? Tasko, vere superanta niajn povojn. Kaj tamen, eĉ en la nuna momento, se mi nur povus atingi, ke unusola delegacio proponu la rezolucion, mi vetus, ke mi sukcesus devigi la plimulton akcepti ĝin. Mi jam havas promeson (mi ne garantias, ke tiu promeso realiĝos) de trideko da delegacioj, inkluzive de la franca, brita, nederlanda, norvega, filipina, indonezia..., ke ili voĉdonos por, se iu ŝtato iom grava faros la proponon. Mi do plue, kvankam la limdato pasis⁹, klopodegas trovi tian delegacion. Se mi malsukcesos, mi provos la saman taktikon kiel en Parizo, nome proponi (sugesti) rezolucion⁷. Ĝis la definitiva perdo mi deziras konservi almenaŭ flamenon da espero, sed, ĝi estas pli rezulto de mia optimisma naturo ol de la realaj eblecoj.

(.....)

Eble, morgaŭ aŭ postmorgaŭ la situacio ŝanĝiĝos, sed mi ne kredas je mirakloj, eĉ ne je tiuj, je kiuj mi mem kontribuas, ke ili okazu. Aliflanke, tamen, mi spertis en mia vivo jam plurfoje, ke eĉ tute senespera situacio en la lasta momento ŝanĝiĝas. Ankaŭ en Parizo antaŭ du jaroj! La bona sorto faru, ke same okazu ankaŭ ĉifoje.

6.2.4 *Daŭre pli malbona situacio (el let. de 05.12.1954).* — Trista kaj naŭza fariĝas la historio. Rakonti pri miaj interparoloj kun la plej diversaj delegitoj de plej diversaj delegacioj estas absolute neeble en unu letero, nek en unu 30-paĝa raporto. Pri tio oni devus skribi libron, grandan libron, kiel dokumenton pri la stulteco de la homoj, pri iliaj antaŭjuĝoj, impertinentecoj, intrigoj, malĝentilecoj ktp. En Parizo mi laboregis. En Parizo mi ĉe la fino malsaniĝis. Mi povas diri nur unu aferon: ĉi tie la situacio estas milfoje pli malfacila, postulas multe pli da pacienco, argumentado, englutado de tre amaraj piloloj, kelkfoje tolerado de rektaj ofendoj. Mi klopodis paroli kun la delegitoj antaŭ la komenciĝo de la kunsidoj, post tiuj kunsidoj, antaŭ la manĝoj, post la manĝoj, en la bufedo, sur la ŝtuparo, en ĉiuj eblaj kaj neeblaj circonstancoj. Mi provis havigi aŭdienciojn ĉe ministroj kaj kelkfoje fine sukcesis (urugvajaj), sed plej ofte ne sukcesis (franca hinda), ĉar en la kelkaj tagoj, dum kiuj ili ĉeestis la Konferencon, ili estis tiel okupitaj (kaj tio estas objektivite vera), ke estis absolute neeble havigi renkontiĝon. Oni devas ĉe ĉio-ĉi montriĝi ege ĝentila, nealtrudiga... En tiaj kondiĉoj mi sukcesis paroli kun eble 300 delegitoj de kvindeko da delegacioj. Praktike kun ĉiuj, krom kun tiuj de Orienta Eŭropo kaj de Usono.

Pri propono de rezolucio neniu volis eĉ aŭdi. Eĉ ne tiuj, kiuj donis la plej favorajn respondojn al Unesko. Ekzemple, la aŭstria delegito Max Lowenthal-Chlumecky diris, ke li scias, ke la aŭstria registaro favoras nian aferon, sed ke li ricevis absolute nenian proponi aŭ iniciati. Sommerfeld diris, ke la favora raporto estis de la Ministerio pri Edukado, sed ke li havas tute aliajn instrukciojn de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj. Kubo, Gvatemalo, Honduraso... ĉio-ĉi estas aro da ignorantoj ne nur pri nia afero, sed eĉ pri Unesko mem. Kvankam tiuj landoj donis favorajn respondojn, la delegitoj tiurilate aŭ scias nenion, aŭ tute simple diris, ke ili havas aliajn instrukciojn. Cu tio estas vera, neniu povos iam kontroli.

Ke mi faris ĉion eblan por doni objektivajn informojn, ne necesas diri. Ni sendis al ĉiuj delegitoj la belegan Dok. CED/4⁸. Al la hispanlingvaj delegacioj ni post kelkaj tagoj sendis belan prospekton pri la ekspozicio⁹. Ĉiuj delegitoj ricevis la inviton al la ekspozicia inaŭguro, sed tre malmultaj venis¹⁰. Ankaŭ poste tre malmultaj delegitoj vizitis la ekspozicion. Entute, se mi ne eraras (la koncerna listo troviĝas en la ekspoziciojo), 15-16... Mallonge, mi troviĝis en situacio, ke mi devis paroli al homoj, kiuj estas surdaj, eĉ pli, kiuj intence ŝtopis la orelojn kaj fermis la okulojn. Kaj plej surdaj estas tiuj, kiuj volas nek vidi nek aŭdi. Mi ofte havis la impreson, ke mi parolas al muro. Eĉ pli malbone, ĉar parolante al muro je difinita distanco oni povas aŭdi almenaŭ sian eŝon. Ĉi tie eĉ la eŝo ne aŭdiĝas.

(.....)

6.2.5 *Fine, trovita: Meksikio (el la sama let. de 05.12.1954).* — En tiaj kondiĉoj mi sukcesis jaŭdon matene (02.12) interesigi sinjorinon Vallarta, membrinon de la Meksikia Delegacio, pri nia afero. Mi iris kun ŝi al la ekspozicio kaj ŝi estis tre frapita. Ŝi prezentis min al la edzo, kiu estas ĉefo de la Meksikia Delegacio. Post multaj klarigoj, mi sukcesis konvinki lin, ke Meksikio faru la proponon de rezolucio. Tio okazis je la 14-a horo. Je la 15-a horo mi sukcesis atingi, ke la sekretariato multobligu la rezolucion. Je la 17-a horo ĝi estis multobligita, sed pro ies interveno ne disdonita al la delegacioj. Intertempe jam kunsidis la Programkomisiono¹¹ kaj nia punkto alproksimiĝis (ĝi estis transmetita al la lasta punkto de la tagordo). Je la 18-a, 30, forkurinte por momento el la Programkomisiono, mi sukcesis, fine, paroli kun la urugvajja Ministro pri Edukado, kiu estas samtempe prezidanto de la Urugvajja Delegacio kaj prezidanto de la Konferenco. Li promesis, ke Urugvajo subtenos la Meksikian proponon. Mi rekuris al la konferencujo kaj konstatis, ke nia afero ankoraŭ ne venis. Tiam la prezidanto (Bourgeois)¹² interrompis la kunsidon kaj kunvokis novan por la 9,30 vespere. En tiuj kelkaj horoj, de la 7-a ĝis la 9-a, mi sukcesis paroli kun deko da delegacioj, kiuj promesis apogi Meksikion. Je la 9,30 mi, kompreneble, estis denove en la salono, kvankam, krom du sandviĉoj, mi nenion manĝis ekde la mateno. Okazis grandega diskuto pri la verkoj de Mickiewicz. Pola Delegacio proponis, ke, oni eldonu libron pri la pola poeto okaze de lia centjara datreveno. La Sekretariato kontraŭstaris pro manko de financaj rimedoj. La afero longiĝis terure (temis pri 6.500 dolaroj; laŭ mia kalkulo la diskuto kostis al Unesko, kune kun la elspezoj de la delegitoj por tiu tempo, ĉ. 13.000 dolarojn!). Pluraj delegitoj komencis lasi la salonon. Alproksimiĝis la 1-a horo matene kaj mi estis tre feliĉa, ĉar neniu el la maljunuloj (Ungaretti, Sommerfeld kaj aliaj malamikoj) estis en la salono. Mi pensis, ke se je tiu horo la prezidanto voĉdonigus la Meksikian rezolucion, ĝi certe estus akceptita. Kaj mi estas certa, ke tiel estus okazinta, ĉar ĉiuj, kiuj estis promesintaj subteni, estis en la salono. Nur Prof. Sassen (Nederlando), kiu promesis voĉdoni por kaj eĉ agis ĉe kelkaj delegitoj en tiu senco, forestis. Sed ne okazis tiel. Je la 1-a matene oni interrompis la kunsidon kaj nia afero denove estis prokrastita.

(Daŭrigo en la sekvanta numero)

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22.3.4 de *EeP*.

1. Temas pri la respondoj de la Statoj-Membroj al cirk. let. de la Generala Direktoro de Unesko CL/720 de 09.02.1953, rezulte de la Rezolucio de la Pariza Sesio de la Generala Konferenco; 2. Tio estis esence grava, ĉar nur surbaze de konkreta propono fare de iu delegacio (eventuale de la Sekretariato), la Generala Konferenco povas fari decidon; 3. Tio estis la lasta limdato por prezenti rezoluciproponon; 4. Prof. Sommerfeld estis la plej influa membro de la Norvega Delegacio; 5. Dum la Pariza Sesio (1952), same tiel, estis maleble trovi delegacion, kiu prezentu proponon pri rezolucio (v. 22.3.2. de *EeP*); 6. V. noton 3; 7. Dum la Pariza Sesio la subskribinto mem, fine, «sugestis» rezoluciproponon, kiun poste la Svisa Delegacio prezentis kiel sian al la Konferen-

co; 8. Temas pri la dokumento de CED «La Internacia Lingvo kaj la Kontribuo de la Esperanto-Movado al la Celoj de Unesko», publikigita en la angla, franca kaj hispana; 9. La prospekto rilatis al Universala Ekspozicio de Esperanto, la plej granda en la tuta historio de la Esperanto-Movado, samtempe la plej impona dokumentego pri la esperantlingva kulturo (poste okazis elmontroj en kelkaj aliaj urboj; la nuna gvidantaro de UEA decidis vendi tiun valoregan materialon, eble ĝi jam estas vendita); 10. Male, la publiko amase vizitadis la ekspozicion; 11. Temas pri la Komisiono pri la Programo kaj Buĝeto, unu el la du grandaj komisionoj, en kiu estas reprezentitaj ĉiuj Statoj-Membroj; 12. Li estis ĉefo de la Svisa Delegacio kaj prezidanto de la Programkomisiono.

7 Du pliaj malneŭtralaj landaj instancoj en UEA

7.1 *Decido de la Komitato de UEA en Ateno.* — Laŭ la oficiala raporto, publikigita en *Esperanto*, n-ro 9/1976, p. 146, “post iom frosta rekomendo de la Estraro, la Komitato kun /per/ granda plimulto favore decidis pri la aliĝo de la landa asocio en Germana Demokratia Respubliko”. La raportinto komentis: “Tiel la Centra Laborrondo Esperanto fariĝis aliĝinta landa asocio de UEA, kio signas finon al kelkjara klopodo politikumi pri la demando kaj sendube estas plia paŝo al la universaleco de UEA”. Laŭ la sama raporto, la Komitato akceptis aliĝojn ankaŭ de la Asocio de Esperantistoj en Slovakio kaj Korea Esperanto-Asocio.

7.2 *Konciza komento.* — Tio, kion la raportinto nomis “fino al kelkjara klopodo politikumi pri la demando” fakte estas fina bato al la klopodo haltigi plian politikigon de UEA, kontraŭan al la pli ol klara preskribo de art. 4 kaj 13 de la Statuto de UEA. La programo de Centra Laborrondo Esperanto de GDR estas detale analizita en 3.1.2 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto* n-ro 3/1976. Sekvas, ke tiu instanco — neniel “laŭorde organizita” landa asocio en la senco de art. 13 de la Statuto — estas evidente politike malneŭtrala. Same malneŭtrala estas la Asocio de Esperantistoj en Slovakio, frata organizaĵo (se entute temas pri organizaĵo en la senco de la Statuto de UEA) de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kies kontraŭneŭtralecaj Programo kaj agadoj estas analizitaj en 3.1.3 de tiu ĉi rubriko en la sama numero de *Horizonto*. S-ro R. Graetz fariĝis komitatano A por la Centra Laborrondo, dum s-ro P. Rosa eniris la Komitaton kiel reprezentanto de AES. Tiu s-ro Rosa estas unu el la subskribintoj de la jam misfama “strikte konfidenca” cirkulero de aprilo 1974 kaj unu el la ĉefaj kompletintoj kontraŭ la neŭtralecon de UEA (detaloj en *Hamburgo en Retrospektivo*, p. 62).

Ne estas klare ĉu Korea Esperanto-Asocio apartenas al Norda Koreo aŭ al Suda Koreo.

Necesas atentigi, ke la supraj decidoj krude malobservas la “malnovan” Statuton de UEA, ĉar la nova Statuto, kiun la nuna gvidantaro de UEA tiom da fojoj pompe antaŭanoncis, ankoraŭ ne estas akceptita. Eĉ pli, la Komisiono pri la Statuto, kiun gvidis s-ro U. J. Moritz, en Ateno ĉesis ekzisti (laŭ *Esperanto*, n-ro 9/1976, p. 156).

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1.2 de *EeP* kaj 5.4 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAJĴOJ

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ)

CELOJ KAJ MEMBRECO

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) estas internacia faka organizaĵo, sendependa kaj politike neŭtrala. Ĝia celo estas duobla: (i) disvastigi la Internacian Lingvon en juraj medioj, (ii) utiligi la lingvon por fakaj, profesiaj kaj jursciencaj celoj. La oficiala lingvo de IEAJ estas la Internacia Lingvo (Esperanto).

La organo de la Asocio, *Internacia Jura Revuo*, aperas du fojojn jare kun varia faka enhavo, ĉefe en la sferoj de jura teorio, kompara juro kaj internacia juro.

Ĉiuj personoj, kiuj diplomiĝis en jura fakultato aŭ jura altlernejo, kaj kiuj parolas la Internacian Lingvon, povas fariĝi regulaj membroj, dum studentoj kaj personoj laborantaj en juraj institucioj povas esti eksterordinaraj membroj. La jara kotizo por ĉiuj membroj estas 120 aŭstriaŝilingoj aŭ egalvaloro laŭ la kurzo en la tago de la pago. La kotizo inkluzivas la abonon al *Internacia Jura Revuo*. IJR estas abonebla ekster la membreco, kaj la jara abono estas 120 aŭstriaŝilingoj aŭ egalvaloro.

Por certigi regulan publikigadon de IJR estas formita la *Fondaĵo Internacia Jura Revuo*.

La kotizojn, abonojn kaj kontribuojn por la Fondaĵo IJR bv. sendi al sekretario-kasisto D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.

Plenuma Komitato de IEAJ

Prezidanto: Prof. D-ro Ivo Lapenna (Universitato de Londono) 77, Grasmere Av. Wembley, Middx. HA9 8TF, Britio.

Vicprezidantoj: Juĝisto Erik Gadd, Kanava aukio, Pistatelo 1, SF 55100 Imatra, Finnlando.
D-ro St. C. Anagnostakis (Eksterordinara Profesoro en la Universitato de Ateno), Box 3503 Ateno, Grekio.

Sekretario-kasisto: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.

JARA ĈEFKUNVENO DE IEAJ

La ordinara jara ĉefkunveno de IEAJ okazis la 3-an de aŭgusto 1976 en aparta saloneto, kiun la organiza komitato de la Dua Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado senpage disponigis tiucele en la Konferencejo.

La kunveno pritraktis ampleksan tagordon. Interalie ĝi akceptis la raporton de la sekretario-kasisto kaj priparolis la publikigon de fakaj terminaroj por diversaj juraj branĉoj, la disvastigon de Esperanto en juraj medioj, la eldonadon de internacijuraj tekstoj en Esperanto. Laŭ la propono de sollicitoro Christopher Baily estas decidite, ke la ĉeftemo de la sekvanta publika kunveno estu "Juraj Kvalifikoj por Praktiki Juristan Profesion kaj Juristaj Profesiaj Organizaĵoj laŭ la Leĝoj de Diversaj Landoj". La kunveno rekomendis al la Plenuma Komitato de IEAJ, ke la sekvanta ĉefkunveno, konforme al art. 7 de la Statuto, okazu dum la Tria Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

Apartan atenton oni dediĉis al *Internacia Jura Revuo*, eldonata de la Asocio. Aŭdiĝis tre laŭdaj vortoj kaj pri la enhavo kaj pri la teknika aspekto de la periodaĵo, precipe pri n-ro 1/1976. La dua numero aperos antaŭ la fino de 1976.

INTERNACIA KONFERENCO DE ILEI EN SAN MARINO

La 10-a Internacia Konferenco de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) okazis en San Marino de la 23-a ĝis la 29-a de julio 1976. Ĉeestis 82 geïnstruistoj el 13 landoj. La inaŭguro okazis en la Palaco de la Kongresoj en San Marino. Tiun solenaĵon ĉeestis la Deputito pri Klerigo kaj Kulturo de la Respubliko kaj la Ĉefepiskopo de Rimini kaj San Marino. La Konferenco, interalie, akceptis rezolucion, kies fina parto rilatas al instruado de Esperanto en la lernejoj. Se la registaro de la Respubliko akceptos tiun parton, baldaŭ devus komenciĝi eksperimenta instruado de Esperanto, sub la oficiala kontrolo de la Ministerio pri Klerigo kaj Kulturo, en unu aŭ du klasoj de la lernejoj de San Marino.

Detaloj pri tiu Konferenco certe aperos en *Internacia Pedagogia Revuo*, organo de ILEI.

EL NIAJ AGAD-GRUPOJ

La dana agadgrupo kunvenis la 4-an de septembro 1976 por plani la *3-an Konferencon de la Neŭtrala Esperanto-Movado*, kiu okazos en Altlernejo Krogerup (vidu aliloke en tiu ĉi numero de *Horizonto*). Ni elektis Organizan Komitaton kun s-ro cand. ocon. H. V. Rasmussen kiel prezidanto.

Peter Zacho prezentis interesan eventualan plian programeron. Li diris:

“La du unuaj konferencoj estis altkvalitaj, precipe la prelegoj estis altrangaj. Sed aŭskultinte prelegojn nur pri lingvaj problemoj kaj pritraktinte nur teknikajn organizajn problemojn, multaj partoprenantoj sentas ian mankon.

NEM estas bazita sur la zamenhafa esperantismo. Sed kio estas zamenhafa esperantismo? Pri tio ni silentas. Certe la nuna estraro de UEA asertas, ke tiu asocio havas kiel idean bazon la zamenhafa esperantismo. Tial estas tre necese, ke ni analizu la problemon. NEM esprimiĝis, ĉar UEA forlasis sian memstarecon, sian neŭtralecon, indon kaj etikon. Ni devas prilabori nian starpunkton. En “*Deklaro de Principoj*” ni legas: “... Tiu komunajo (la esperantista) havas moralan devon konservi ekster ĉiu ajn alia ideologio la neŭtrale homan kulturan karakteron de la zamenhafa Esperanto kaj de la humaneca internaciismo esence ligita al ĝi.”*

Mi mem partoprenis en la verkado de tiu deklaro. La citita punkto enhavas du aspektojn: 1. la neŭtralecon kaj 2. la humanecan internaciismon, alivorte la ofte cititan “zamenhofan esperantismon”.

Esperanto-movado okupante sin sole pri lingvaj kaj organizaj problemoj estas, laŭ mi, antaŭkondamnita al morto. Tial estas tre necese, ke ni okupiĝu pri la ideo (la etika) aspekto. Ni povus inviti du-tri kompetentajn esperantistojn prelegi pri la *idea esperantis-mo*. Ekzemple unu prelegu pri la temo “La hamburgaj eventoj en la lumo de la etiko de Zamenhof”, alia pri “Kio estas zamenhafa esperantismo?”. Mi garantias al vi, ke la tuta altlernejo bolos por interesiĝo. Post kiam prof. Lapenna forlasis UEA aŭdiĝas tie preskaŭ nur malplenaĵ vortoj. Feliĉe ni forlasis (dank’ al Lapenna) la sektecon, sed ni gardu nin ne fali en la malan abismon; timi entute paroli pri ĉio etika.

Ĉiuj konsentis pri la graveco de la prezentita temo. Verŝajne ni fiksis unu tutan tagon sole por prelegoj kaj diskutoj rilatantaj “la zamenhofan esperantismon”. Ni petas reagojn de la legantoj de *Horizonto!*

Nia konferenco okazos en la komforta kaj moderna domkomplekso de Altlernejo Krogerup. Ĉiuj do estos kune en la sama loko la tutan tempon. Ni opinias tion tre grava por sukcesplena konferenco. Ni atendas la aliĝon de ĉiuj sinceraj esperantistoj, ankaŭ de tiuj, kiuj ne povos partopreni, sed solidariĝas kun la celoj de la sendependa neŭtrala Esperanto-Movado, libera de kiu ajn parti-politika influo.

* Vidu p. 25 en *Horizonto*, n-ro 1, 1976.

MALLONGE

HEJS - 100. — La Hispana Esperanto Junulara Sekcio festis la numeron 100 de sia organo per eksterordinara kajero, kio estas elmontrite de entuziasmo, organiza sento kaj laborkapablo.

Ne ĉiam estas facile — por ne profesiuloj — aperigi revuon, kaj HEJS-bulteno ĉiam aperis akurate. Koran gratulon al HEJS kaj speciale al ĝia estraro kaj al la redaktoro de la revuo, kiuj faris de simpla sekcio, gravan organizaĵon!

LITERATURA KONKURSO “MAJA VOĈO” 76 (por mallonga rakonto). — Estis prezentitaj 13 konkursaĵoj, el kiuj 1 estis nevalida.

La juĝantaro konsistanta el tri membroj: Emiliĵa Lapenna, verkisto, redaktoro kaj estinta longjara sekretario de Beletraj Konkursoj, (prezidanto); Marinko Gjiĵoje, publicisto-jurnalisto, kaj Boriŝa Miliĉević, poligloto, juna E-verkisto, (membroj) prijuĝis la alvenintajn verkojn kaj donis jenan verdikton:

I-an premion gajnis S-ro Bernard Golden (Hungarulo) por “Malegala disdivido” (60 poentoj).

II-an premion gajnis S-ino Zora Heide (Jugoslavio) por “La Ciganino” (58 poentoj).

III-an premion gajnis S-ro Clive Rees (Britio) por “Hazarda sorto aŭ ĉiela interveno” (51 poentoj).

Ni gratulas la gajnintojn, speciale nian kunlaboranton, Bernard Golden.

HEROLDO DAŬRIGAS MENSOGADON.

En n-ro 15/76 de tiu gazeto, aperis aserto, ke R. Hauptenthal kaj F. de Diego ekŝiĝis el la redakta komitato de “Horizonto”, kiun Heroldo nomas “organo de la t.n. neŭtrala movado, inspirita de la eks-prezidanto de UEA”. La vero estas ke R. Hauptenthal ne ekŝiĝis, sed la Dua Konferenco de NEM decidis, ke restu la sama redakta komitato, kiu funkciis de la komenco, kaj mi kiel ĉefredaktoro volonte akceptis tiun decidon. F. de Diego ne ekŝiĝis, sed pro profesiaj laboroj provizore ne povas redakti sian rubrikon.

La neŭtrala Esperanto-movado ne estas “t.n.”, sed fakte ekzistanta ekde 1887. Ĝi ne estas inspirita nur “de la eksprezidanto de UEA”, sed ĝin inspiradis Zamenhof, Hodler, Privat, kaj ĉiuj grandaj batalantoj por la Internacia Lingvo kaj la Zamenhafa humaneca esperantismo.

Inés Gastón

BALADO

Kiam li antaŭ sepdek jaroj
l' Unuan Libron ekkaresis,
kaj inter liaj okulharoj
grandguta ĝojolarmo mezis:
la Verk', por kiu li elspezis
junaĝan ĝojon, staris brile,
ekkanti li tre necesis:
«Ho kor', ne batu maltrankvile!»

Kaj kiam, malgraŭ ĉiuj baroj,
l' Afero kreskis kaj progresis,
kaj jam entuziasmaj aroj
en Bulonjo sur Mar' kongresis,
mirakla sento lin impresis,
kaj krei volis li jubile:
sed gurgopremo ne permesis:
«Ho kor', ne batu maltrankvile!»

Kaj en la tempo de l' amaroj,
kiam la mondo murd-ekcesis,
el homa sango kreskis maroj,
ĉiuj esperoj ŝajne ĉesis,
al koro, kiu tiel pezis
en orust' spiranta malfacile,
la lastan peton li adresis:
«Ho kor', ne batu maltrankvile!»

Vin mil-mil langoj ne forgesis
Majstro, sed ĝemas ni simile
nun, ĉar la mond' atomarmile
sin minacante refrenezis:
«Ho kor', ne batu maltrankvile!»

Kolomano Kalocsay



DEMANDITE

Post tiuj televidnovaĵoj kaj
prognoz pri vasta ŝtormo, vi scivolas
pri mi, poeto apud furiozo
dum la centro kirliĝas pli proksimen.

Tegoloj falos, putros homa karno
inter ruinoj kaj — post fum abrupta
en multaj lokoj — restos vundobruloj
de geviroj ŝiritaj pli profunden
ol pens aŭ sento. Tiam mavo plia:
la lantaj abomenoj de malsato
kaj konscienco. Ie stumblos aŭ kuŝos
ankaŭ mi kaj la miaj, aŭ ni kaŭros
post murkolapso inter frakasitaj
mebloj sub pluv apokalipsa, malemaj
forlasi por vagado tra vakuoj
ĉi korangulon de la kunfeliĉo.
Sentegmentigon certe atendadas
komuna peko kaj senkulp komuna.

Kaj poste? Espereble rekonstruo.
Sed ĉio, diferenca, tre similus.
Nu, kia ŝanĝo eblas? Novaj estroj
ja povas entrepreni modon novan
de ekspluato kontraŭ la proletoj
(en ties nomo), ĉar la malriĉuloj
ne povas ne estadi tre mizeraj,
kiel en Sovetio aŭ Zair.

Ho povraj naivuloj! La penso sole
liberalporta estas tro subtila
por cerbe peza. Sin retrudus tasko
obei al novstila aroganto
del kontorist eterna, kiu estos
denove, kiel sub reĝimo burĝa,
impertinente duonintelekta,
sed danĝere sen koro aŭ kulturo.
Al serpo kaj martel la plum ordonas.
Jen via klaso vere ekspluata.

Pro la renverso kelkaj sklavoĵ kaptus
reĝecon — nu, sub nom pli eleganta! —,
por bajoneti, en fervor prudenta,
sed baldaŭ ekimiti la antaŭan
dinastion. Ekzemplas ŝtatfeŭdismo
kaj caroj en la nuna mondo rusa
aŭ plutokrata kasto en Usono.
Ĉu, krom slogane, vere diferencas
ĉi hirudoj el tre malsamaj marĉoj
kaj tempoj dekstra aŭ liva diktaturo?
Montriĝas, ke Hitlero kaj Stalin
parencis, ambaŭ nepoj de Nerono.
La ligno de la ideologioj
laŭ sia homefik indiferentas,
se temas pri la svingo del bastonoj.

Jes, mi vin aŭdas, malgraŭ la tempesto!
Vi krias, kel blankuloj tamen perdis
monopolian rajton ekspluati.
Nur parte vi komprenas la sistemon.
Tia progres jam komenciĝis, ĉar
iksodoj ankaŭ bistraj nun emerĝas.
Ĉu ne kolera vento ĉiujn blankajn
purige forbalaos el la lando?
Tro facile. Purige forbloviĝus
volonte, antaŭ tia fisentenco
de la rasismo nigra, instruistoj —
kandeloj en mallumo vasta —, doktoroj
por korp kaj menso kaj la farmistaro
kiu nutradas duonkontinenton
ankoraŭ sen kapablo aŭ inklin
vere fruktigi agrojn, kiuj ne
respondos nuran propagandon, surdajn
krom al prudenta lingvo de laboro.

Necesas plia justo, kunstrebadado
por politiko de stomako plena,
scio, sano, kultivo kaj kulturo,
sed ankaŭ ŝanco en angul kvieta
libere babiladi kun amiko
dum lampo ĵetas ombrojn sen minaco,
legi libere ekster la katenoj
de la cenzur kaj hominsultaj falsoj
far ia senvalora politika
tiel nomata menso, aŭ (plej grave
inter gravajoj) plenlibere servi
al sia Dio aŭ idolo, dum sun
serenas super land feliĉa.

Ne
necesas fifrakaso por konstrui.
Revolucion... koran mi sopiras.
Milit aŭ murdo povas nur plubredi
senĉese sangan murdon kaj militon —
frol unua, Kaina bastonbato
ĝis lasta bombo sur la urbo lasta.
Friponaj ŝtatoj subvencias, kaj
finfine tiras al si, terorisman
aŭ sur amikojn nerevatan veon:
Angolo, Brita Insular, Libano...
Seminton la rikolto ne surprizu.
Jen la recepto de malsanaj mensoj —
eĉ eminentaj —, diabliĝintaj pastroj
(ĉi apostataj) aŭ konsil subhoma,
kiu ankoraŭ kaŭras en kavernoj
ie interne, ĉar la nura bruto
la sunon timas kaj la kamptrankvilon.

La celon maljustigas firimedoj.

Aŭskultu, aŭskultu — tiu tumultiĝo,
surda, malice sen prudento! Tamen
antaŭ ol min atingas uragano
kun kiu oni ne rezonas, jen
la spuroj de korspito lumsoifa.

25.4.1976

Edwin de Kock

Gloso: fro = for de, k.t.p.

Don Quijote de la Mancha

Capitro XLII de la Dua Parto

Pri la konsiloj de Don Quijote al Sancho Panza, antaŭ ol ĉi lasta komencis regi la insulon, kaj pri aliaj gravaj aferoj.

La gedukoj tiel multe kontentiĝis je la amuza kaj plaĉa aventuro de Dolorida, ke ili decidis daŭrigi la farson, vidante, kiel facile mistifikeblaj estas la objektoj de iliaj ŝercoj. Tiel do, ili instrukiis al siaj servistoj kaj regnanoj pri la maniero trakti Sanchon en la afero de la regado de la promesita insulo. Kaj unu tagon post la flugo de Clavileño, la duko diris al Sancho, ke li sin preparu okupi la postenon de gubernatoro, kaj ke liaj insulanoj jam atendas lin, kiel pluvon oni atendas en majo!

Sancho riverencis kaj respondis:

—De kiam mi descendis de la ĉielo, post ol mi rigardis de ĝia impona alto kaj vidis la teron tiel eta, iom moderiĝis mia forta deziro gubernatori, ĉar, kian gravon havas regi super sinapa semeto, aŭ kian dignon kaj aŭtoritaton oni ricevas mastrante seson da homoj grandaj kiel avejoj? Vere, ŝajnis al mi, ke ne ekzistas pli da ili sur la tuta tero. Se via moŝto degnus doni al mi parteton de la ĉielo, larĝan eĉ se nur je unu mejlo, mi ĝin akceptus pli volonte ol la plej grandan insulon de la mondo.

—Konsideru, amiko Sancho—respondis la duko— ke mi ne povas doni parton de la ĉielo, eĉ ne tiel etan kiel ungo, ĉar tiaj favoroj kaj rekompencoj estas rezervitaj nur al Dio. Mi donas al vi kion mi povas, nome, veran kaj solidan insulon, rondan, bonproportcian kaj ekstreme fertilan, kie, se vi scios lerte regadi, vi povos akiri samtempe la riĉojn de la tero kaj de la ĉielo.

—Nu, bone, venu jam la insulo—respondis Sancho.—Mi klopodos regi ĝin tiamaŭ niere, ke mi iros al la ĉielo spite al ĉiuj friponoj. Kaj ne pro ambicio aŭ pro vanta fiero mi volas levi min al pli altaj postenoj, sed pro la deziro scii, je kio gustas la gubernatoreco.

—Se vi gustumos ĝin unufoje, Sancho—diris la duko— vi ne volos forlasi ĝin, ĉar dolĉegas ordoni kaj esti obeata. Kiam via mastro fariĝos imperiestro—kio nepre okazos, laŭ la iredo de liaj aferoj— oni ne facile detronigos lin, kaj li sentos aflikton kaj pezan bedaŭron en sia koro, pensante pri la tempo, kiam li ankoraŭ ne imperiestris.

—Sinjoro—respondis Sancho.—Mi imagas, ke regadi estas bona afero, eĉ se oni regas nur gregon da bovoj.

—Oni min enterigu apud vi, Sancho—diris la duko.—Ĉion vi scias! Kaj mi esperas, ke vi estos tiel bona gubernatoro, kiel via saĝo promesas. Sed nun ni lasu ĉi aferon. Memoru, ke jam morgaŭ vi devos iri okupi la gubernatoran postenon de la insulo, kaj ĉi-vespere oni havigos al vi la kostumon adekvatan al via rango kaj ĉion necesan por via vojaĝo.

—Oni vestu min laŭvole—respondis Sancho.—Sed en ajna kostumo mi estos la sama Sancho Panza.

—Vi pravas—diris la duko.—Sed la vestoj devas kongrui kun la ofico aŭ la posteno okupata. Ne decus, se juristo portus kostumon de soldato, aŭ soldato kostumon de pastro. Vi, Sancho, estos vestita parte kiel juristo, parte kiel kapitano, ĉar en la insulo, kies regadon mi cedas al vi, la armoj tiel necesas kiel la letroj?

—Pri letroj mi apenaŭ scias ion—respondis Sancho— ĉar mi ne konas ankoraŭ la abocan. Sed sufiĉas, ke mi memoru la dekalogon, por esti bona gubernatoro. Rilate al la armoj, mi uzos ĝismorte kiajn oni donos al mi. Kaj ĉio okazu laŭ la volo de Dio.

—Kun tiel bona memoro, Sancho, vi ne povos fari erarojn—diris la duko.

Ci-momente aperis tie Don Quijote, kaj kiam li sciiis kio okazas kaj kiel baldaŭ Sancho okupos sian postenon, la hidalgo, kun la permeso de la duko, prenis la ŝildiston je la mano kaj kondukis lin al sia ĉambro por konsili lin, kiel li devus kondukti en sia ofico. Ili eniris do en lian ĉambron, Don Quijote fermis post si la pordon, preskaŭ devigis la ŝildiston sidiĝi apud li kaj kun solena voĉo diris:

—Senfine mi dankas la ĉielon, amiko Sancho, ke antaŭ ol la sorto min favorus, la fortuno venis renkonti kaj akcepti vin. Mi, kiu atendis mem sukcesi por rekompenci vin pro viaj servoj, troviĝas ĉe la komenco atingi eventualan profiton, dum vi, antaŭtempe kaj kontraŭ ĉiaj logikaj supozoj, vidas vian deziron plenumita. Kelkaj intrigas, ĝenas, petas, insistas kaj klopodas senĉese sed ne ricevas la oficon deziratan. Kaj jen, prezentiĝas alia kaj sen scii kiel aŭ kial, troviĝas en la posteno, kiun la ceteraj pretendis. Al ĉi okazoj tre adekvatas la diro, ke ekzistas bona kaj mava sorto inter la aspirantoj. Mi opinias, ke vi estas vera ŝtipo. Tamen, sen klopodi de la mateno ĝis la nokto, sen ja penado de via flanko, vi, per la nura fakto, ke vin tuŝis la spiro de la vaganta kavalirismo, vidas vin, senplie, gubernatoro de insulo... Nenia bagatelo, vere! Mi diras ĉion ĉi, Sancho, por ke vi ne atribuu ĉi favoron al viaj propraj meritoj, kaj por ke vi danku unue la ĉielon—kiu tiel bone aranĝas la aferojn— kaj poste la grandecon implicitan en la profesio de la vaganta kavalirismo. Kun la koro inklina kredi min, atentu, filo, kion mi, via Katono, vin konsilos, ĉar mi volas esti la stelo, kiu orientu vin atingi sekuran havenon el inter la tempestaj ondoj de ĉi maro, kien vi iras navigi: ĉar la gravaj oficoj kaj postenoj estas nur profundaj gulfoj da konfuzo.

“Unue, filo, vi devas timi Dion: ĉar en ĉi timo sidas la saĝo, kaj, se saĝa, vi neniam povos erari.

“Due, vi devas konsideri kio vi estas kaj, plej malfacila tasko imagebla, klopodi koni vin mem. El tia konado vi lernos ne ŝveli de fiero, kiel la rano, kiu deziris grandi kiel bovo. Ĉar, simile al la pavo, kies parada vosto falas, kiam la birdego rimarkas la turpon de siaj piedoj, via orgojlo vundiĝos de la penso, ke vi gardis porkojn en via vilaĝo.

—Efektive, tio okazis en mia infanaĝo —respondis Sancho. —Sed poste, kiam knabo, mi gardis, ne porkojn, sed anserojn. Sed ŝajnas al mi, ke ĉio ĉi ne menciindas: ne ĉiuj regantoj devenas de reĝaj familioj.

—Vi pravas —diris Don Quijote. —Tial, la personoj sen nobela origino devas kombini la gravon de siaj funkcioj kun ia mola afablo, kiu, gvidata de la prudento, liberigu ilin de la klaĉado, kies pikoj trafas ĉiun rangon kaj staton.

“Konfesu senkaŝe, Sancho, la humilon de via origino, kaj ne hontu diri, ke vi devenas de kampara gento; tiel, vidante, ke vi ne hontas, oni ne havos la intencan humiligi vin. Prefere estu virte humila ol peke orgojla. Nekalkuleblaj personoj de modesta deveno levis sin al plej supraj rangoj pontifikaj kaj imperiestraj, kaj mi povus citi al vi tiom da ekzemploj ĉi-rilate, ke vi laciĝus aŭskulti.

“Atentu, Sancho: se vi sekvas la vojon de la virto kaj plenumas nur virtajn agojn, vi ne devas senti envion kontraŭ la personoj, kiuj naskiĝis sinjoroj kaj princoj, ĉar la sangon oni heredas, sed la virton oni akiras, kaj la virto per si mem havas pli da valoro ol la sango.

“Tiel do, se iu el viaj familianoj okaze venus viziti vin al via insulo, ne ignoru aŭ ofendu lin; male, akceptu lin afable kaj kompleze kaj regalu lin: tiel vi kontentigos Dion, ĉar Li ne ŝatas, ke oni disdegnu kion Li kreis, kaj krome vi kondutos konforme al la leĝoj de la naturo.

“Se vi venigos vian edzinon (ne konvenas, ke viro okupata en funkcioj de regado tenu for dum longa tempo sian edzinon) instruu kaj eduku ŝin kaj poluru ŝian naturon, ĉar se ordinare saĝa gubernatoro gajnas al si prestiĝon, aliflanke lia edzino, se rustika kaj stulta, ĝin ruinigas kaj detruas.

“Se vi vidviĝus (kio povus okazi) kaj pro via posteno vi devus edziĝi denove al virino de pli alta rango, ne prenu ŝin tia, ke ŝi uzu vin kiel logilon kaj fiŝkanon por sia persona profito: ĉar, verdire, pri ĉio, kion ricevas la edzino de juĝisto, respondos la edzo antaŭ la aŭtoritato de Dio kaj devos repagi kvaroble kiom lia edzino akceptis sen lia scio.

“Neniam lasu vin regi de la kaprico kaj de la arbitro, kiel faras la stultuloj, kiuj kredas sin inteligentaj.

“Montru pli da kompato, sed ne pli da justeco, por la larmoj de la paŭperaj, ol por la pledoj de la riĉaj; klopodu trovi la veron inter la promesoj kaj donacoj de la riĉaj, same kiel inter la ploroj kaj la impertinento de la paŭperaj.

“Ĉiuokaze kiam la justeco permesos, ne ŝarĝu sur la deliktulon la tutan rigoron de la leĝo: juĝisto severa ne havas pli bonan famon ol juĝisto kompatema.

“Se okaze fleksiĝus al vi la vergo de la justico, ĝi fleksiĝu, ne pro la pezo de la donacoj, sed de la mizerikordo.

“Se vi devus juĝi super afero de malamiko via, ignoru la kaŭzon de via ofenditeco kaj atentu nur iri ĝis la vero de la kazo.

“Ne permesu, ke propra pasio blindigu vin en fremda afero, ĉar, ĝenerale, viaj eraroj estus, aŭ neripareblaj, aŭ ripareblaj nur je la kosto de via reputacio aŭ eĉ de via havo.

“Se bela virino petus de vi justecon, deturnu la okulojn de ŝiaj larmoj kaj la orelojn de ŝiaj ĝemoj, kaj konsideru senurĝe la esencon de ŝia plendo, se vi ne volas, ke via prudento dronu en ŝia ploro kaj via virto en ŝia suspiroj.

“Ne mistraktu parole la personon, kiun vi devas submeti al fizika puno: ne necesas aldoni insulton al la torturado de kompatinda homo.

“Konsideru la kulpulon submetitan al via jurisdikcio kiel povran viktimon regatan de la inklinoj de nia perversa naturo kaj, sen ignori la rajtojn de liaj akuzantoj, laŭpove montru vin pardonema kaj mizerikorda al li, ĉar, kvankam ĉiuj atributoj de Dio estas egalaj, ŝajnas al ni pli brila kaj valora la mizerikordo ol la justeco.

“Se vi sekvos ĉi regulojn kaj preceptojn, Sancho, viaj tagoj estos longaj, via famo eterna, viaj rekompencoj abundaj kaj via feliĉo nesuperebla; vi edzigos viajn filojn laŭdezire, kaj ili kaj viaj nepoj havos moŝtajn titolojn; vi vivos en paco kaj ĝuos la estimon de la homoj, kaj en la lastaj paŝoj de via vivo, en olda aĝo milda kaj matura, atingos vin la morto, kaj la molaj kaj delikataj manoj de viaj pranepoj fermos al vi la okulojn. Ĉi instrukcioj koncernas la edukon de via animo. Nun aŭskultu kion mi devas diri por la bono de via korpo.

Elhispanigo de
Fernando de Diego

Notoj

1. *kiel pluvon oni atendas en majo* — t. e. kun senpacienca kaj espero, kiel la kampuloj atendas la pluvojn de la printempo kiel garantitan de riĉa rikolto.
2. *letroj*: hispane, *letras*; france, *lettres*; angle, *letters*: gramatiko, retoriko, poezio, juro, teologio, klasikaj lingvoj ktp., t. e. la bazaj studoj de la antikvaj kleruloj.



Manresa, Floraj Ludoj 1975
La Reĝino de l' Poetoj kaj ŝia honora kortego

ĈU ANKORAŬ LA FLORAJ LUDOJ ?

Troviĝas skribite en PIV, ke la Floraj Ludoj estas "poeziaj konkursoj en kiuj oni iam donacis al la premiitoj oran aŭ arĝentan floron". Tio estas ne plene vera, ĉar la adverbo "iam" donas konkretan ideon pri pasinteco. Ĉu do, laŭ tiu difino, tiaj konkursoj estas jam tute eksmodiĝintaj kaj apartenantaj definitive al historiaj epokoj?

La realo manifestiĝas alimaniere, pro la konstatebla fakto ke la FL ankoraŭ nun estas vigle aktualaj en Katalunujo, de kiam en la jaro 1859 ili estis restarigitaj kaj efikis, super ĉiu alia agado, por antaŭenpuŝi pli kaj pli sukcese la Renaskiĝon de la kataluna lingvo kaj ĝia beletro. De tiam, do, la plimulto el tiuj poetoj konsiderataj pli-malpli tradiciaj, ne ĉesas konkurse prikanti la konstantan trioblan devizon: "Patrujo, Dio kaj Amo".

Laŭ regularo de la primitivaj FL naskiĝintaj en Tuluzo (Okcitanujo), la graf-reĝo de Katalunujo kaj Aragono Johano la I-a, per dekreto subskribita de li mem en la urbo Valencio la 20-an de februaro 1393, starigis ilin en Barcelono, kie dum multaj sinsekvaj jaroj ili pompe famis kaj disvolviĝis. Sed, poste, iom post iom ili dekadencis ĝis neniigo.

Kiam ekvekiĝis la ŝajne mortinta spirito de tiu forpasinta glorego de la kataluna lingvo (post tri jarcentoj da lanta estingiĝo sub cindro de malestimo kaj submetiĝo), plejado da eminentaj intelektuloj havis la genian trafan ideon instige alvoki la katalunlingvajn poetojn konkursi tiel, kiel oni faris en la XIII-a kaj XIV-a jarcentoj. La invito trovis tujan plej ĥoran

eŝon, kaj, seninterrompe ĝis hodiaŭ, en la tiel nomataj "Katalunaj Landoj" la FL estas denove tute aktualaj, ĉar krom en Katalunujo, ankaŭ en Valencio, la Baleara Insularo kaj Rusiljono, per ili oni ĉiujare kultas la Poezion.

La precipa Premio konsistas el la tiel nomata "Natura Floro" kiun la gajninto donacas al la "Reĝino" elektita, ordinare, de la premiito mem. Rekompence, ŝi, kiel "Reĝino de l' Poetoj", prezentas al tiu oran rozon. La dua kaj tria Premioj konsistas el, respektive, "Jasmenon el oro" kaj "Violo el oro kaj arĝento", aljuĝataj al la aŭtoroj de tiuj elektitaj versaĵoj prikantantaj respektive la Patrujon kaj la fidelecon al spiritaj, moralaj aŭ religiaj valoroj.

Ĉiujare oni celebras en Barcelono tiun poezian feston la unuan dimanĉon de majo. Sed, ĝi, dum la tri jaroj de la hispana interfrata milito, kompreneble, ne okazis. Tuj poste, kaj dum tridek-unu sinsekvaj jaroj, la FL de Barcelono estis malpermesataj. Dume, nur povis okazi (kaj, fakte, okazis nur kiel simpla surogato) kastili-katalunlingvaj FL neoficialaj, kaj oni celebradis ilin, regule aŭ sporade, en multaj urboj aŭ kvartaloj de Barcelono. Bonŝance, de post la jaro 1971 tiu Konkurso denove disvolviĝas kun la sama antaŭa brileco kaj prestiĝa reprezentiveco.

Je la finiĝo de la hispana milito, pro la bedaŭrinda malpermes-cirkonstanco, komenciĝis flanka stadio de la FL pro la jena kialo. Ĉar la plimulto de la kataluna intelektularo estis devigata ekziliĝi sen perspektivo de baldaŭa reveno, kelkaj el

tiuj katalunoj troviĝantaj precipe en Meksiko, alspireme kreis en la jaro 1941 Patronaron por organizi anstataŭajn Florajn Ludojn laŭ samaj regularo kaj trajto de tiuj oficialaj de Barcelono, sub epiteto "de la kataluna lingvo". Sed tiuj havis la specialan karakteron de migrantaj, ĉar ĉiujare estis — kaj ankoraŭ estas — ĉu Amerika, ĉu eŭropa urbo kie ili okazas. Nun, do, celebrigas regule (sed je malsamaj datoj) tiuj de Barcelono kaj de la Meksika Patronaro. Espereble, tre baldaŭ alvenos por ili komuna konkordo — do, reunuiĝo. Dume, ili kultas saman celon.

La FL, malgraŭ la "nuntempa materialismo" kaj ĉiamaj objetantoj, estas plene enradikiĝintaj en la animo de la katalunoj. Ne strange, do, la esperantistoj de tiu hispana regiono, ek de la plej frua epoko de la Movado, avidis kaj sentis bezonon enkonduki la Florajn Ludojn en la Esperantan lingvon, pro tio, i.a. ke ĝi estas tiel taŭga por la poezia kreado.

Okaze de la V-a UK en Barcelono, ĝia juna Prezidanto Frederic Pujulà i Vallès deziris enskribi en ĝian kadron la eventon de la unuaj esperantlingvaj FL de la beletra historio. Kiel estas sciata, la Poezia Konkursko sukcese okazis, kaj la poetino Marie Hankel gajnis la koncernan Naturan Floron — aŭ ĉefan premion. Parolante pri ŝi, K. Kalocsay skribis en "Norda Prismo" (kajero 4, jaro 1958):

"Ŝia gloro kulminis en 1909 — preskaŭ duoncentjaro — kiam per sia poemo "La simbolo de l' amo" ŝi gajnis la Naturan Floron en la unuaj Esperantaj Floraj Ludoj, kaj fariĝis por la jaro 1909-1910 la unua Reĝino de la Poezio. Kun naive grava digno ŝi portis tiun honoron, certe sian plej grandan travivaĵon. Ŝi adresis "Leteron al la regnantoj", kaj post la jaro, kiam ŝi

transdonis la tronon al alia reĝino, (ĉifoje ne maljuniĝanta poetino, sed ĉarma kataluna knabino, praktikanta kaj ne verkanta la poezion de la vivo), ŝi adiaŭtis siajn regatojn per abdika poemo."

Kelkajn jarojn post la dua mondmilito, Prof. Delfi Dalmau per artikoleto publikigita en "Heroldo de Esperanto" sugestis celebri denove kaj unufoje tian poezian konkurson, kiel solenan programeron de unu UK por omaĝe rememori jubileon tiun de 1909. Sed neniu responsulo konsideris la ideon enkondukinda, ĉar nur en katalunaj iom romantikemaj rondoj kaj mensoj svarmas la projekto pri FL.

Pli poste, la iama Kataluna Esperanto-Federacio (tiel amanta la beletristikon!) okazigis dum pluraj jaroj en la kadro de siaj epokfaraj Kongresoj, solenajn Internaciajn Florajn Ludojn. Gloraj poetoj de la Esperanta Parnaso, kiel Kalocsay, Baghy, Grau Casas k.a., gajnis la honoran Naturan Floron. La organo de KEF "Kataluna Esperantisto" publikigis ĉiukaze la ĉefajn premiitajn verkojn, kaj recenzis ĉiam tre detale.

La lasta internacia florlda konkurso estis tiu de la lasta Kataluna Kongreso okazinta en Manresa la jaron 1936-an, kiu estis tiu de la XVII-aj Internaciaj FL kaj tiu de la XVIII-a Kataluna Esperanto-Kongreso. Tiuokaze oni aljuĝis al la "trobadoro" Jaume Grau Casas (la kompilinto kaj ĉefa tradukinto de la pionira "Kataluna Antologio") la Naturan Floron. Tuj poste, la kruela intercivilana milito ĉion misdraŝis kaj forbalais.

Por iomete ilustrati ĉi tiun skizitan tekston, jen unu soneto el la kvar per kiuj, sub la titolo "Familia poemaro" Jaume Grau Casas gajnis la lastan Naturan Floron:

AL MIA PATRINO


Pro via frua morto mi vin ne rememoras:
mi povas iel diri, ke mi ne konis vin.
Sed tamen tute ofte mi vin funde priploras...
ĉar vi simile iam priploris ankaŭ min.

Ne estas kon', memoro, sed vin mi ne ignoras,
mi sentas en mi ion el via propra sin';
perdita lula vorto eĉ nun vibras, sonoras,
aŭ en silenta vivo mi nur imagis ĝin.

Min vivo ne dorlotis, vi ankaŭ ĝin ne povis,
neniam miaj vortoj respondon vian trovis,
ne sentis mi karesojn patrinajn, el la kor';
sed en momento ĝoja aŭ en moment' ĉagrena,
en horo plej intima, en horo plej solena,
vivas en mi ĉiam, patrin', via memor'.

INICADO EN LA GROTO

de Bernard Golden



René Duval, kaŭrante antaŭ amaso da ŝtonoj kaj terbuloj, zorgeme forbalais tavolon da tero por malkovri fragmentojn de flavbrunaj ostoj. La arkeologo, profesoro ĉe la Instituto pri Prahistorio en Parizo, alvenis hieraŭ por esplori sur la monteto nomata La Roko de la Diablo, kie tieuloj hazarde trovis restaĵojn de pratempaj bestoj kune kun ŝtonaj iloj. Akompanis lin kelkaj liaj gestudentoj kaj ankaŭ André Martin, specialisto pri kvaternara geologio. Ili starigis sian tendaron sur herboriĉa ebenaĵo tuj apud la rivero, proksimume unu kilometron alvale de la prifosad-loko.

Finpurigante la ostojn per delikataj peniktiloj, Duval elpoŝigis sian notlibron kaj, turnante sin al la apudstarantaj studentoj, komencis priskribi la trovaĵojn. "La ostoj estas fosilioj aĝantaj plimalpli dudek mil jarojn... jen, tiuj estas de prahistoriaj ĉevaloj, kiuj vagadis en tiu ĉi valo dum la magdalena periodo. Povas esti, ke ili paŝtigis tie sur la ebenaĵo apud la rivero."

Tie sur la ebenaĵo apud la rivero paŝtigas ĉevalaro. Estas frua somero. La aero estas friska, la suno varmeta kaj la akvo en la rivero frida, ĉar ĝi venas ĉe la montaro ankoraŭ kovrita de glaĉero. Nun la ĉirkaŭaĵo estas silenta kaj paca, sed baldaŭ venos homoj, ĉasistoj. Dumvintre la familioj kutime loĝas izolite, tre malproksime unu de la alia kaj ili vivtenas sin per la ĉasado. Somere la ĉasado ne okupas la virojn ekskluzive, ĉar la virinoj kaj infanoj povas suplementi la viandnutraĵojn per la kolektado de sovaĝ-plantoj. Tiu ĉi sezono do fariĝas okazo de socia kunigo por interŝanĝo de virinoj kaj por inicado de junuloj. Tiaj renkontiĝoj estas gravaj eventoj, ĉar ili certigas la kontinuo de la malgranda hom-grupo en tiu severa ĉirkaŭmedia areno, kie konkuras la naturo, sovaĝbestoj kaj homoj.

"...kaj homoj?" scivole demandis unu el la studentinoj. "Ĉu vi ankoraŭ ne trovis homajn ostojn tie ĉi?"

"Ne", respondis Duval, skuante la kapon. "Homaj ostoj estas pli maloftaj ol tiuj de bestoj. Krome, ostoj ne bone konserviĝis en la severa plejstocena ĉirkaŭmedio." Fermante sian notlibron kaj stariĝante, li aldonis, "...kvankam kelkfoje, se oni estas bonŝanca, oni povas malkovri restaĵojn de enterigo aŭ..."

"Paĉjo! Paĉjo!" Duval estis interrompita de la alveno de malgranda knabo, kiu haste kuris malsupren sur la deklivo. "Paĉjo, ili venas! Ili trovis ion", ekscitite kriis Pierre, la dekjara filo de la arkeologo. Ankaŭ por li la prifosado estis emocia travivaĵo, ĉar estis la unua fojo, ke lia patro permesis al li viziti la esplor-lokon.

Post la anhelanta knabeto venis du viroj, ambaŭ kovritaj de koto kaj ŝvito. Unu, diketa mezaĝulo, portis geofizikan sondilon surdorse kaj rulaĵojn de mapoj en la mano. Sekvis lin alta pli juna viro vestita en loza overalo. Surkape li havis ministan kaskon kaj traŝultre pendis volvaĵo de fortika ŝnuro. Antaŭ ol atingi la lokon, kie Duval staris, senpolvigante sian veston, André Martin, la geologo, laŭte anoncis. "Ni sukcesis! Tie sur la monteto estas groto."

Tie sur la monteto estas groto rigardanta al la ebenaĵo. Ĝi estas la sankta groto, la celo de la migrado de la homoj al tiu ĉi valo. En la groto okazos la inicad-ceremonioj por knaboj, kiuj dum la pasinta jaro eniris en la aĝ-klason markantan la transiron de infano al plenkreskulo. La paŝtigantaj ĉevaloj jam forkuris antaŭ la apero de la homoj. Nun la alvenintaj familioj starigas siajn

tendojn sur la verda herbotapiŝo de la ebenaĵo, kaj apud la rivero ludas aroj da infanoj. Ili babilas ĉefe pri la venontaj solenaĵoj, kaj de tempo al tempo la voĉoj mallaŭtigas ĝisflustre, kiam iu mencias la sanktan groton, fingromontrante al la kruta flanko de la monteto.

Fingromontrante al la kruta flanko de la monteto, la alia alveninto, Louis Lebrun, ano de la loka klubo de grotesplorantoj, konfirmis la novaĵon. "Ne estas dubo... estas granda groto tie."

"Mi... mi sondadis la tu... tutan monteton." Martin, senspira, apenaŭ povis eligi la vortojn. "K... kaj mi... mia aparato indikis, ke tie supre estas iuspeca kavbo sub la surfaco. Louis komencis serĉi inter la ŝtonegoj kaj trafis en truon. Saĝnas, ke ĝi estas parto de pasejo aŭ koridoro."

"Mi sukcesis eniri", aldonis Lebrun, "kaj rampis en parto de subtera galerio longa kelkdek metrojn. Ce la alia finaĵo estas ĉambro aŭ salono — mi ne povis taksi ĝian grandecon — sed mi opinias, ke valoras provi esplori ĝin."

Prenante la notlibron de Duval, Martin rapide skizis la geologian strukturon de la monteto. "Origine estis tie ĉi grandega kaverno. Ĝi havis almenaŭ du nivelojn, sed la supra parto, kiu ekzistis en la ĝusta loko, kie ni nun staras, detruigis en la pratempo pro iu katastrofo, plej verŝajne lavango."

"Jes", intervenis la grotesploranto. "Mi jam plurfoje vidis terfalojn sur tiuj ĉi deklivoj."

Montrante unu el siaj mapoj, Martin klarigis: "Laŭ la tektonika mapo, la tuta regiono estas malstabila."

"Kion vi opinias pri la ebleco esplori la suban parton de la kaverno hodiaŭ?" demandis la arkeologo.

"Nu..." hezite respondis Martin, "laŭ Lebrun tio estus tre malfacila, ĉar la galerio estas obstrukcita de falintaj ŝtonoj."

Lebrun, desegnante kelkajn kromajn strekojn sur la paĝo de la notlibro, daŭrigis la klarigon. "Ni bezonas iom da tempo por malembarasi la vojon... rigardu, tie ĉi... por ke oni povu atingi tiun ĉambro. Morgaŭ mi venigos anojn de nia speleologia klubo por helpi."

"Lebrun pravas. Ni atendu ĝis morgaŭ", konsilis Martin. "Fakte, estas riske prifosi tie ĉi eĉ nun pro la ebla enfalo de alia parto de la kaverno."

Tamen Duval tre malpaciencis kaj pludemandis. "Ĉu vi ne povas gvidi min al la galerio, Louis? Vi jam estis tie. Mi scivolas, ĉu estas homaj restaĵoj en tiu parto de la groto, ekzemple artaĵoj aŭ pentraĵoj sur la muroj."

La respondo de Lebrun ne estis kuraĝiga. "Pro la rokfalo oni devas tratabi al si vojon, kaj nur unu homo povas eniri la galerion. Krome, la "kat-truo" ĉe la alia finaĵo estas pasejo taŭga nur por sveltuloj."

Nek Martin nek Lebrun povis konvinki Duval pri la danĝero de improvizita malsupreniro en la kaverno.

"Ĉu vi havas sperton pri grotesplorado?" demandis Lebrun.

Duval iom honteme konfesis, ke ne. "Mi estas novico. Tiu ĉi prifoso estas mia unua laboro en neesplorita groto. Pro tio, mi volas esti la unua vidi la prahistoriajn restaĵojn post dudek jarmiloj. Hodiaŭ mi iniciĝos al la speleologio."

"Bone, se vi tiel deziras", malgraŭvole konsentis Lebrun. Li enmanigis al Duval sian ministan kaskon kaj acetilenan lampon. "Kunportu ankaŭ pioĉon kaj ŝovelilon."

La tri viroj komencis suprengrimpi la deklivon en la direkto de la enir-truo. Pierre, kiu staris apud sia patro dum la daŭro de la interparolado, estis tute absorbata de la preparoj por la esploro en la prahistoria groto kaj komencis sekvi la virojn.

"Pierre!" vokis la arkeologo. "Iru al la rivero ludi aŭ helpi la studentojn lavi ostojn."

"Ne!" protestis la malgranda knabo. "Mi ne iros al la rivero. La akvo estas tro malvarma. Mi volas iri kun vi."

"Mi ne permesas tion. La groto estas tro danĝera loko por infano."

"Mi ne estas infano!" ripostis Pierre, kolere stamfante la grundon. "Venontan aŭtonon mi estos dek-unujara."

Dek-unujara knabo, lavinte sin en la glacia akvo de la rivero, kuras sur la herbkovritan bordon al la loko, kie sidas lia fratino kaj pli juna frato. Li saltetas kaj frotas siajn brakojn kaj krurojn.

"Ĉu la akvo ne estas tro malvarma por vi?" demandas la fratino?

"Tute ne!" respondas la knabo kun malestima rigardo, kvazaŭ la demando estus insulto kontraŭ li. "Mi jam alkutimiĝis je ĝi. Mi devas prepari min por la inicado. Oni diras, ke en la groto estas necese transiri riveron."

"En la groto estas necese transiri riveron", informas Lebrun. "Ĉu vi havas botojn?" Duval kapneas.

"Jen, prenu miajn, "diras Martin, detirante siajn kaŭĉukajn botojn.

Doninte lastminutajn instrukciojn al la arkeologo, Lebrun gravmienne ligis unu finaĵon de la ŝnuro ĉirkaŭ la talio de Duval. Pierre, restante en la proksimeco rigardis la scenon. La viroj staris en silenta atendo antaŭ la enirejo de la groto.

Viroj staras en silenta atendo antaŭ la enirejo de la groto. Inter ili estas la olduloj de la klano kaj la ŝamano, vestita en feloj kun masko sur la vizaĝo kaj cerva kornaro surkape. Li nerveze kuras tien kaj reen, donante instrukciojn. Aliaj viroj alportas torĉojn kaj ŝtonpintajn lancojn. La junaj inicotoj ariĝas en apuda loko sur la deklivo, atendante la alvokon.

“Ĉu vi ne timas eniri la groton”, la frateto demandas kun pepanta voĉo. “Oni diras, ke estas multaj sovaĝbestoj en ĝi.”

“Ne, etulo”, respondas la knabo. “Oni ne rajtas timi, kiam oni fariĝas plenkreskulo. Ĉu vi ne komprenas tion, stulĉjo?”

“Ĉu vi ne komprenas tion, stulĉjo? Mi jam diris, ke estas tro danĝere por vi tie ĉi.” Denove la patro de Pierre admonis sian fileton. “Obeu min kaj iru al la malsupra parto de la monteto.”

Pierre, ankoraŭ paŭtante, malproksimiĝis iomete, ĝis li trovis kaŝlokon. Tie li kolektis malgrandajn ŝtonojn en sia mankavo kaj komencis sencele ruli ilin malsupren sur la deklivo. De tempo al tempo li jetis rigardon al la plenkreskuloj apud la groto. Tie Lebrun, forte tenante la ŝnur-volvajon, descendigis la arkeologon en la truon. Pierre amare pensis pri la malavantaĝoj esti knabo kaj demandis sin, “Kiam oni fariĝas plenkreskulo?”

“Kiam oni fariĝas plenkreskulo?” demandas la frateto.

“Nu, kiam oni jam ne sentas timon”, fiere respondas la knabo, ludeme taŭzante la hararon sur la kapeto de la infano.

La ŝamano eksonoras sian tamburon kiel signalon por la ekirigo de la ceremonio. Kelkaj olduloj komisiitaj akompani la knabojn, urĝe antaŭenpuŝas tiujn, kiuj iom tro malrapide iras en la direkto de la groto. Kun la ŝamano ĉekape, la partoprenantoj en la solenaĵo eniras en la groton. La procesio unue trapasas la grandan salomon, poste malsupreniras en serpentuma koridoro kaj fine atingas la malvastan galerion. Tie oni povas antaŭeniri nur unuvice. En la mallumo aŭdiĝas malakuta murmuro. Plaŭd!... ŝmac! Plaŭd!... ŝmac! La rivero!

Plaŭd!... ŝmac! La rivero! Duval sukcesis trovi la vojon tra la galerio kaj nun li vadis en la rivero, kie liaj botoj glitis sur la ŝlima fundo. Provante apogi sin kontraŭ la malseka muro por ne perdi sian ekvilibron, li pensis, kiel la prahomoj multe pli facile iris tiun ĉi vojon nudpiede.

Nudpiede la knabo enpaŝas en la riveron kaj apenaŭ tremetas, kvankam la glacia akvo atingas liajn genuojn. Ĉe la alia bordo, la galerio fariĝas funelforma, kaj la viroj devas klini unue la kapon, poste la dorson. La piedoj de la knabo enpremas sian formon en la molan gluigan argilon, sed tenante sin rekta li marŝas antaŭen. Ĉe la malalta plafono estas aŭdebla la grincanta skrapado de ŝtonaj lancpintoj. Tie kaj ĉie la fumantaj torĉoj lasas fulgomakulojn.

“Fulgomakuloj... skrapaĵoj de ŝtonaj iloj” flustris la arkeologo, direktante la lumfascon de sia lampo al la plafono. “Ne estas dubo nun. Mi estas en la ĝusta loko.” Li volis plirapidi, sed daŭre stumblis kontraŭ la ŝtonoj ŝtopantaj la galerion. Plurfoje li estis devigita antaŭeniri mane kaj genue, jen tenante la fosilojn, jen puŝante ilin antaŭ si. “Homoj paŝis tie ĉi!” li diris mirfrapite, ekvidinte hardiĝintajn piedspurojn sur la surfaco de la grundo. “...kaj tiuj malgrandaj piedsignoj... venis ankaŭ knaboj... samaĝaj kiel Pierre.” Abrupte haltigis lin amaso da ŝtonoj antaŭ aperturo en la muro, la “kat-truo”. Li nun troviĝis en la plej mallarĝa parto de la galerio.

La plej mallarĝa parto de la galerio, nura truo en la muro, ne estas obstaklo por la movlerta knabo, kiu facile tordiĝas tra la aperturo kvazaŭ kato. Ĉe la alia flanko li trovas sin en vasta alta salonego, la sanktejo, nun lumigata de dekoj da torĉoj. Tie ĉi en la plej profunda parto de la kaverno, la knabo ekvidas mirindaĵon. Antaŭ liaj larĝe malfermitaj okuloj aperas la muroj kaj plafono la sovaĝbestoj de la groto, aroj da mamutoj, bizonoj, ibeksoj, cervoj, ĉevaloj, rangiferoj, kapreoloj, same kiel li vidis en la fora hejma valo, kiam li iris ĉasi kun paĉjo. En la flagranta torĉ-lumo ŝajnas, ke la bestoj vivas, paŝtiĝas, kuras, vundiĝas, mortas. Tio ja estas la vivo mem. “Nekredeble!” li flustras, starante sur piedpintoj kaj streĉante siajn okulojn.

Starante sur piedpintoj kaj streĉante siajn okulojn, la arkeologo provis vidi super la ŝtonamaso kaj lumigi la malhelaĵon ĉe la alia flanko de la “kat-truo”. Jen! Li ekvidis sur la kontraŭa muro la pentraĵojn de la bestoj kaj li forte emociiĝis. “Tie ĉi estas la sanktejo ornamita per riĉa trezoro de prahistoria arto. Certe estas almenaŭ kvindeko da bestoj... kaj ankaŭ figuroj!” En la duonlumo liaj akrevidaj okuloj trovis homajn figurojn kaj simbolajn markojn. Sur la grundo li rimarkis ankaŭ la grandajn sabojn kaj blokojn, kiuj defalis de la plafono, kiam la kaverno skuigiĝis okaze de la pratempa katastrofo. “Mi devas eniri!” li diris decidite kaj laŭtvoĉe. Lia provo nudmane forpuŝi la ŝtonojn estis senrezulta. Enmanigante la pioĉon, li komencis dispecigi la amasegon da ŝtonojn. Pum!... pum! Pum!... pum!

Pum!... pum! Pum!... pum! La olduloj laŭtakte batas la grundon per siaj lignaj lancfustoj. Pum!... pum! Pum!... pum! Unisone aŭdiĝas la tamburado de la ŝamano, kiu dancas kaj ĉantas. La knabo rigardas denove al la muro. Tie estas alia figuro dancanta inter la ombroj, homa figuro, la Granda Estaĵo de la kaverno, pri kiu la olduloj rakontis dum la longaj vintraj vesperoj ĉirkaŭ la fajro. La knabo uzas sian tutan fortostreĉon por regi sin, por forigi timon, por montri, ke li indas esti inicato. Ju pli rapide sonas la tamburo, des pli rapide batas lia koro.

Despli rapide batis lia koro, ju pli rapide malembarasiĝis la vojo antaŭ la arkeologo. Urĝita de la anticipo de granda malkovro, Duval devigis sin al pli vigla laboro. Pum!... pum!... pum! Tra la galerio obtuze resonis la pioĉ-batoj kaj la falo de frakasitaj ŝtonoj, kiujn li senorde ĵetis malantaŭ si. Nun la truo inter la ŝtonoj fariĝis sufiĉe granda kaj la sanktejo estis pli bone videbla. Duval momente ĉesigis la pioĉadon por ekzameni la art-verkojn. "Kia vicleco! Kia realismo de pentrado! Bonŝance la bildoj estas sendifektaj." La ritmo de la pioĉado freneze rapidiĝis. Denove la arkeologo ekstaris kaj fiksas siajn ŝvitbanitajn okulojn sur la kontraŭa muro. "Kio estas tio? Ĉu iluzio kaŭzita de la lumo kaj ombroj? Ŝajnas, ke la bestoj moviĝas, alproksimiĝas..."

Ŝajnas, ke la bestoj moviĝas, alproksimiĝas... La knabo reflekse retropaŝas. Kuŝantaj bizonoj levas sin, paŝtigantaj cervoj suprenturnas la kapon, ĉevaloj ekgalopas. Aŭdiĝas blekoj, muĝoj, krioj. "Kio estas tiu laŭta ektondro? Ĉu la voĉo de la Granda Estaĵo?" La knabo frenezmiene ĉirkaŭrigardas. "Kie estas paĉjo?"

"Kie estas paĉjo?" demandis Pierre, atendante sur la deklivo ekster la kaverno. Li ekpromenis en la direkto de la enir-truo. "Kial li ne revenas?" Subite li aŭdis surdigan bruon.

Ankaŭ Duval aŭdis la surdigan bruon kaj faligante la pioĉon, li gapis al la vigligantaj bestoj. La plafono vibris kaj li apenaŭ povis apogi sin ĉe la pulsanta muro. Sanceŝiĝis ankaŭ la grundo sub liaj piedoj. Timo ekkaptis lin.

Timo ekkaptas lin. La knabo ne povas aŭdi sian propran voĉon pro la bruego, kiu dronigas ankaŭ la takton de la lancteniloj. Tuj venas renkonte al li la granda bizono de sur la plafono. "Paĉjo! Paĉjo!" li krias kun teruro en sia koro. "Paĉjo! Paĉjo!"

"Paĉjo! Paĉjo!" Pierre eksentis teruron, kiam ĉirkaŭis lin sonora tondrado kaj tuj poste grandaj ŝtonoj alruliĝis de sur la supro de la monteto. "Paĉjo! Paĉjo!"

Du malgrandaj knaboj ploré vokas siajn patrojn, sed iliajn feblajn voĉojn superbruas la orelfenda muĝado de tunoj da ŝtonegoj, kaj La Roko de la Diablo enterigas bestojn kaj homojn.

Junio 1976

INTERNACIA JURA REVUO (IJR)

Jam la 13-an jaron aperadas *Internacia Jura Revuo*, sendube unu el la plej gravaj fakaj periodaĵoj en la Internacia Lingvo. La revuo estas organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Ĝi aperas du fojojn jare kun varia faka enhavo, ĉefe en la sferoj de jura teorio, kompara juro kaj internacia juro. Ekzemple, n-ro 1/1976, enhavas ampleksan artikolon de Prof. D-ro I. Lapenna (Universitato de Londono) "Atingoj kaj Malsukcesoj de Unuiĝintaj Nacioj — Okaze de la tridekjara datreveno de la fondiĝo". La aliaj artikoloj estas verkitaj de D-ro Karl Schulze, kand. jur. Tom Arbo Høeg, D-rino Flora Szabo, D-ro Klaus Perko, D-ro Genĉo Genĉev, soliciĉtoro Christopher Bailly, D-ro L. Márton. La artikoloj rilatas al laborprotekto laŭ la juro de kelkaj landoj, al kompenso pro damaĝoj kaŭzigitaj per akcidentoj, proprietaj rilatoj inter geedzoj, strukturo de la Parlamento en Hungario, grupaj deliktoj de junaĝuloj, la jura pozicio de skabeno.

Ekde n-ro 2/1976 estos enkondukitaj kelkaj novaj rubrikoj: *notoj* pri internacie interesaj juraj eventoj; *precipe* en ligo kun la lingva problemoj; *recenzoj* pri fakaj verkoj publikigitaj en kiu ajn lingvo; *glosaroj* pri juraj terminoj; *informoj* pri IEAJ.

La nuna redaktoro estas Prof. D-ro Ivo Lapenna, dum la teknika redaktoro estas kand. jur. Tom Arbo Høeg. La 48-paĝa periodaĵo (plus kovriloj) estas presata en la pre-sejo de la Universitata Biblioteko en Oslo.

La membroj de IEAJ (jara kotizo 120 aŭstriaŝilingoj) ricevas la revuon senpage, kaj la jara abonprezo por nemembroj estas, same tiel, 120 aŭstriaŝilingoj. Kvankam faka, tamen laŭ la prezentomaniero de la temaro, la periodaĵo estas populara kaj facile komprenebla por ĉiu klera persono. La Estraro de IEAJ esperas, ke multaj en la Esperanto-Movado, kvankam ne juristoj, abonos la du numerojn de 1976 kaj fariĝos regulaj abonantoj.

SUKCESOJ EN BRITUJO

Sendependa laborgrupo en Britujo troviĝas sur la sojlo de sukceso en la popularigo de Esperanto inter miloj da universitataj studentoj. La grupo kiu organizas tion estas *GROUP FIVE: Esperanto on Radio and Television* (GRUPO KVIN: Esperanto en la Radio kaj Televido), kiu estis fondita en 1972 kun la celo persvadi radio- kaj televid-instancojn elsendi Esperanto-kursojn. Ĝia Inaŭguro estis impona: en la granda hindstila Pavilono de Brighton la loka urbestro estis proklamita la 'unua Honora Ano de Group Five', kaj ĝia Organizanto, s-ro Peter Schilperoord, ceremonie pinglis orumitan emblemon de Group Five sur la jakon de Lia Ekscelenco.

Samtempe, kaj tute koincide, studentoj en Universitato de Essex, petis Esperantan radio-kurson kiun ili povus aŭdigi pere de sia universitata radio-stacio. Group Five jam havis sian unuan komision. Post ne longe estis produktita la radio-kurso *Jen Nia Mondo*. Ĝia kvalito impresis la studentojn. Unu kialo sendube estis ke la kursdirektoro, d-ro John Wells, jam havis profesion sperton pri BBC-kurso pri la angla lingvo por jamajkanoj en Londono. La studentoj entuziasme akceptis la kurson, kiun ili kvarfoje dissendis. Poste, kiam Universitato de Lancaster aĉetis la kurson por sia lingvolaboratorio, la studentoj disaŭdigis ĝin, kaj formiĝis tie malgranda studgrupo.

Tamen la demando restis, kiamaniere vere popularigi la kurson inter la studen-

toj. La duan de januaro ĉi-jare en Londona Esperanto-Klubo la aŭtoro prezentis programeron "Jam temp' está". Rezulte de tio la Organizanto de Group Five ricevis inviton prelegi en la jarkunveno de Nacia Asocio de Studenta Radio-elsendado (NASB), kiu okazis nur kelkajn semajnojn poste.

Intertempe Group Five ellaboris planon por persvadi la radio-staciojn disaŭdigi la kurson, kaj por popularigi ĝin inter la aŭskultantoj. En la jarkunveno de NASB, kiun ĉeestis 90 studentoj, s-ro Schilperoord anoncis grandan konkurson kun du premioj.

Alia agado de Group Five estas la eldono, por helpi subvencii pluan laboron. Diversaj kasetbendoj kaj bobenbendoj estas nun haveblaj kun la kurslibro. Group Five jam havas ambiciajn planojn, tamen je la nuna momento plej gravas la projekto: Esperanto en la Universitatojn. Ĝi ne nur provizos tute novan generacion da junaj Esperantistoj, kiun la movado en Britujo urĝe bezonas; ĝi popularigos la ideon de internacia lingvo inter dek ĝis dudek mil studentoj. Guste ili estas la instruistoj kaj profesuloj de nia estonto, kiuj devos trovi solvon al nia daŭre kreskanta lingvo-problemo.

Detalajn informojn same pri la laboro de Group Five, kiel pri plena listo de aĉetebla materialo vi povas ricevi de: Ian Fantom, 140 Brookfield Road, BEDFORD —Britujo—.

Ian Fantom

JE MEMORO!

VITOLDO MAJEWSKI

El Varsovio atingis min funebra sciigo. Subite la 13-an de septembro mortis sincera kaj kara amiko Vitoldo Majewski. Esperantisto de multaj jaroj ankoraŭ antaŭ la mondmilito li ĉiam estis fervora, fidela disĉiplo de Zamenhof kaj liaj idealoj. Ne ŝparante siajn fortojn kaj energion li diversmaniere klopodis pri disvastiĝo de sia amata ideo — esperantismo. Jen i.a. antaŭ la milito li prelegis en Varsovia Esperantista Societo pri siaj vojaĝoj tra la mondo pere de la internacia lingvo, montrante la unikan libregon kun blazonoj kaj flagoj de la ŝtatoj, vizititaj de li, jen li preparis kaj pendigis sur vagono en kiuj varsoviaj esperantistoj veturis al la unua postmilita kongreso en Lodzo en 1946, verdante tolan ŝildon kun konforma teksto, vekante ĝeneralan interesigon pri Esperanto. Majewski aranĝis brilajn esperantajn ekspoziciojn, sukcese prezentitajn ankaŭ eksterlande (i. a. en Ĉeĥoslovakujo). Li ankaŭ vigle kunlaboris kun la subskribinto dum la malfavora periodo de la esperanta movado en Polujo. Ĉiam sindonema, laborema li aktive partoprenis ĉiujn esperantajn aranĝojn en Varsovio, ofte iniciatinte ilin. Proprainciate li zorgis pri la tombo de Zamenhof kaj mem aranĝis laŭ sia projekto florbedon kun esperanta stelo meze antaŭ la domo, staranta sur la loko de iama domo ĉe strato Dzika — Zamenhofa 9. La morto de Vitoldo Majewski estas granda perdo por la esperanta movado.

Kiu do nun zorgos pri la tombo de la kreinto de Esperanto kaj florbedo ĉe la strato Zamenhofa en Varsovio?!...

Mag. Isaj Dratwer, Israelo

17.07.1976.

D-ro A. Bormann
 Redaktoro de Interlingvistika Informa Servo
 Schaumanns Kamp 126,
 D-2057 Reinbek.

Estimata Redaktoro,

La redakcio de *Horizonto* sendis al mi fotokopion de p-oj 26-27 de via *Interlingvistika Informa Servo*, n-ro 2/76. Estas afero de la redakcio ĉu taŭge reagi je tiu via kvazaŭa recenzo, aŭ ignori ĝin. Ĉar en via teksto vi plian fojon grave misprezentas faktojn rilate min persone, mi atendas, ke vi observos la elementan regulon de ĵurnalisma etiko kaj publikigos en la sekvanta numero jenan korekton:

1. Vi asertas, ke en la rubriko "Esploro kaj Dokumentado" de *Horizonto* mi "speciale akcentis mian propran redaktorecon" de *Esperanto en Perspektivo*. Fakte, mi tion ne akcentis, nek necesas akcenti, ĉar el la verko mem klare vidiĝas, ke mi estas ĝia ĉefredaktoro, kune kun U. Lins kiel redaktoro, kaj ke mi mem verkis ĉ. duonon de la libro, kvankam eĉ tion oni volis prisilenti. Kion mi diris en ereto de tiu ampleksa rubriko, estas io tute alia, nome ke la nuna gvidantaro de UEA krude malobservas miajn aŭtorajn rajtojn. Aldone: la t.n. "Esperanto-dokumentoj", kiujn nun eldonas UEA, estas grandparte kontraŭleĝa plagiato de miaj ĉapitroj en *Esperanto en Perspektivo*.

2. Vi denove parolas pri miaj kvazaŭaj "kritikantoj". Efektive, nek antaŭ Hamburgo, nek post ĝi, mi kiam ajn legis aŭ aŭdis kian ajn kritikon pri mia laboro por Esperanto ĝenerale kaj por UEA speciale laŭ la ĝishamburga linio. Eĉ d-ro Tonkin rekonis en Hamburgo: "D-ro Ivo Lapenna ...per sia spirito kaj sia kuraĝo trenis la Esperanto-Movadon al novaj altaj kaj atingoj... Kaj se ni povos per tiuj niaj malmultaj fortoj porti UEA ankoraŭ pli alten..., mi estos danka ĝuste al la vojo, kiun montris Ivo Lapenna" (*Esperanto*, n-ro 9/74, p. 147). La hamburgaj eventoj ŝuldiĝas nek al mia "vojo", nek al mia laboro, sed al la politika konspiro kaj kunligitaj ĉiaspecaj misagoj, kiel abunde dokumentite en *Hamburgo en Retrospektivo*.

3. Plian fojon vi asertas, ke mi nomis miajn «kritikantojn "abscesoj je la Movado"». Unue, vi miscitas, ĉar mi uzis la esprimon "abscesoj sur la organismo de UEA". Due, eĉ esperantlingvaj komencantoj, kiuj legis tiun admonan artikolon, perfekte scias, ke tiu esprimo, tre milda kompare kun la realaĵo, rilatis ne al personoj, sed al "tiuj evidentaj negativajoj, kiuj haltigis ĝian /de UEA/ progreson kaj minacas ĝian ekziston", kiel eksplicite dirite en la antaŭa alineo (*Esperanto*, n-ro 4/74, p. 65). Se s-ro U. Moritz kaj eble aliaj aplikis tiujn vortojn al si mem, tio estas ilia afero, pri kiu mi neiel respondecas. Cetere, preskaŭ ĉio antaŭvidita en tiu artikolo — kelkriate eĉ pli ol antaŭvidite — jam realiĝis. La fakto, ke en nuraj 2 jaroj sub la reĝo de politikaj konspiroj kaj kunligitaj malkorektaĵoj UEA perdis unu kvinonon de sia individua membraro, estas nur ekstera signo de la pli ol bedaŭrinda stato.

4. Diri, ke mi estis "devigita rezigni per novelektoj" estas ŝoka malvero. En la elektoj por komitatanoj B mi ricevis plebiscitan apogon de 84 %. Mi rezignis pri ĉiuj miaj funkcioj en UEA kiam mi konstatis, ke la politika konspiro sukcesis kaj ke, do, UEA por la unua fojo en sia historio perdis sian laŭstatutan neŭtralecon.

Kun salutoj
 Dro. I. Lapenna

Pro la portempa foresto de Fernando de Diego, la redakcio mem provizore prizorgas lian rubrikon en HORIZONTO. Ĝi aperados sub la titolo "Tra la Esperanto Gazetaro", tiel ke lia brila "Revuo de la revuoj" povu reapari tuj, kiam liaj personaj cirkonstancoj permesos, ke li reprenu sian rolon, espereble tre baldaŭ.

ESPERANTO de septembro 1976, dediĉita plene al la UK en Ateno, atingis kulminon en la "arto" statistikadi kaj kontraŭdiri sin mem. Kiom da kongresanoj ĉeestis? Ni legas sur p. 138, ke "en la ĉeesto de pli ol 1200 kongresanoj (nia substreko) el kvindeko da landoj, la prezidanto aparte salutis...". Tamen, en ĉefartikolo "Kuraĝa kongreso en Ateno" (kial "kuraĝa"?), sur p. 137 la magiisto-redaktoro donas jenan absolute unikajn takson: "Kiam baldaŭ finiĝos traktado kun la Bulgara Esperantista Asocio, kiu peris grupan aliĝon al la kongreso de pli ol 280 kongresanoj el tiu lando, la fina nombro de aliĝintoj al la 61-a UK estos ĉ. 1350 kongresanoj el 51 landoj".

Do, kune kun la 280 nealiĝintoj, estos ĉ. 1350! Laŭ la sama statistika logiko "Esperanto" povus kalkuli: kune kun la 1000, aŭ 2000 ktp. nealiĝintoj, estis 2000 aŭ 3000 ktp. kongresanoj! Sed laŭ la elementa matematiko 1350 minus 280 estas 1070 (?) kaj se oni bone scias, ke regule ĉ. 10 % de la aliĝintoj ne partoprenas, restas enigmo. Aŭ, eble, la nealiĝintoj ĉeestis? Ankaŭ la jugoslavia "Voĉo", kvankam verŝajne pli realeca, ne estas tute certa, ĉar ĝi skribis: "Ŝajnis, ke ĉiuj 1000 kongresanoj venis al solena inaŭguro" (n-ro 7.8/1976, p. 16). Kiom, do: 1000, 1200, 1350? Kial oni prisilentas la ĝustan nombron de aliĝintoj? Kial oni ne klarigas "la traktadon kun la Bulgara Esperantista Asocio"? Cu eĉ tiaj informoj estas cenzurataj en la nuna UEA?

La fakto estas, ke UK en Ateno — urbo de unikaj kultura valoro kaj beleco devis altiri almenaŭ 1800-2000 kongresanojn, sed pro la nunaj cirkonstancoj en UEA tiu nombro estis multe pli malalta.

En la sama numero de "Esperanto" legindas jena bombasta frazo: "Ne estas troigo aserti, ke oni al tiuj komisionoj ŝuldas la fakton, ke ni nun havas efikan Komitaton kaj dinamisman Asocion". "Horizonto" jam plurfoje montris, ke ĉiuj tiuj "komisionoj, komisiitoj, laborgrupoj kaj aferŝarĝitoj", kreitaj en Hamburgo kaj post ĝi, estas "granda telero, malplena kulero" (Zamenhof). Ekzemplo de tia "efikeco" aŭ "malplena kulero" troviĝas sur p. 156 de tiu numero. Jen ĝi laŭvorte:

"Post dujara laboro kaj kvar antaŭprojektoj aŭ skizoj de la nova Statuto de UEA (kiun la Asocio post kelkaj aldonaj jaroj, pliaj poluroj, projektoj, diskutoj kaj ĝenerala voĉdono verŝajne havos), en Ateno ĉesis funkcii la komitata Komisiono pri la Statuto, kiun gvidis U. J. Moritz. Ankaŭ la kvara statutskizo konservis kelkajn pure moritz-ajn terminologiajn kaj difinojn. En la komitatkunsidoj en Ateno, kie oni aŭdis nur laŭdojn pri la laboro de la Komisiono, gvidata de Moritz, en neformalaj sondaj voĉdonoj montriĝis, ke eĉ Moritz mem ne voĉdonis por siaj propraj proponoj, sed vidinte la reagojn de aliaj komitataj — li sin detenis."

Kia efikeco! Tamen, kiel skribas la sama sinjoro redaktoro sur p. 146, tiu "nova laborstilo... grandioze kontribuis al la serenigo de la atmosfero, kie oni nun — imagu! — ne malofte eĉ havas tempon por spriti kaj ridi..." En la Komitato, kompreneble. Pri kio? Pri sia propra "efikeco"? Pri perdo de unu kvinono de la individua membraro? Aŭ pri tiuj, kiuj senkritike englutas tiajn absurdaĵojn?

—o(o)—

La Ĉeĥa STARTO (n-ro 4.5/1976) malkovras en la linioj kaj inter la linioj de la ĉefartikolo, ke en Ĉeĥoslovakio la esperantistaro, fidela al la zamenhofa esperantismo, kuraĝe rezistas politikan endoktrinigon. Z. Křimský, la nuna sekretario de ĈEA skribas:

"Tiu ĉi komplika procezo estis krome malhelpata per intence provokitaj krizaj momentoj, kalumnioj pri ŝtatpotencoj organoj kun la tendenco maksimume misordigi la situacion, vekti malfidon ĉe la asocio membraro kaj kompromiti la gvidajn funkciojn. Tiuj ĉi aĉaj intencoj kaj planoj estis komence eĉ sukcesaj. Sub la influo de diversaj ne tute precizaj kaj ĝustaj informoj ĉesis fidi al la nova estraro de ĈEA ne nur unuopuloj, sed ankaŭ tutaj grupoj."

Tamen, ekde kiam s-ro Křimský fariĝis sekretario, ŝajne ĉio "pliboniĝis", ĉar "kiam mi enoficiĝis kiel sekretario de ĈEA, mia tuta strebado celas envicigon de la Asocio en la kulturan vivon de la tuta socio, gajni respekton por ĝi surbaze de la ŝtata kultura politiko (substreko nia)...".

Kaj tiu "ŝtata kultura politiko" estas koncize difinita sur p. 4:

"La Asocio sekvas senskue sian strategian linion kaj preparas sin por la pluj pretendaj taskoj en la tempo, kiam nia tuta socio realigas la direktivojn de la 15-a kongreso de KPC /Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio/ por la 6-a kvinjarplano."

Tute konforme al la antaŭhamburga konspiro kaj sukcesinta hamburga puĉo, la artikolo daŭrigas la atakojn kontraŭ Prof. I. Lapenna, ĉefe pro lia dokumenta verko "Hamburgo en Retrospektivo", kiu, ni sciigas, sekrete cirkulas kaj estas avide legata en Ĉeĥoslovakio.

Tiu evidente politika organo de partipolitika organizaĵo atakas ankaŭ la Fundamenton de Esperanto. Sur p. 7 estas skribite:

"Malracia kaj blinda estas la espero pri la fina venko de Esperanto, se aliflanke mankas amasa konscio pri la ĉiutagaj kaj perspektivaj taskoj de la Movado. Komprenoble, la movada konscio, kiu hodiaŭ, en la tempo de spacveturoj, fidas je la Fundamento, nepre konflikta kun la realo."

Ne necesas kia ajn komento. Sufiĉas memori, ke laŭ art. 5 de la Statuto de UEA, la oficiala lingvo de UEA estas "La Zamenhofa lingvo Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per sia Fundamento kaj sia verkaro". Ni ankaŭ memorigas, ke en la Aprila Artikolo Prof. Lapenna antaŭvidis ankaŭ tion: "Do, la sekva viktimo estos la Fundamento mem, tiu sendiskute baza lingva kerno, al kiu ŝuldiĝas la nuna vivanteco kaj unueco de la lingvo" (Esperanto, n-ro 4/1974, p. 63).

Oni ne forgesu, ke ĈEA plu estas aliĝinta asocio de UEA kaj estas reprezentita en ĝia "efika" Komitato, en kiu oni "eĉ havas tempon por spriti kaj ridi".

—o(o)—

La t.n. INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO de D-ro A. Bormann (la patro de la vicprezidanto de UEA, D-ro W. Bormann) daŭrigas siajn atakojn kontraŭ Prof. Lapenna, F. de Diego, Jean Thierry kaj la tuta "Horizonto" (n-ro 3/1976, p. 17). La sola ekspliko de la vorto "interlingvistika" en la titolo estas, ke la redaktoro aŭ ne scias ĝian signifon, aŭ per tiu vorto maskas siajn verajn intencojn. La atako estas sub kia ajn nivelo kaj ni povas nur reagi per "bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno" (L. L. Zamenhof, Proverbaro).

El la sama numero ni sciigas, ke D-ro A. Bormann rifuzis publikigi leteron de Prof. Lapenna kun korektoj de krudaj malĝustaĵoj, publikigitaj en n-ro 2/1976 de IIS, ĉar la letero estis "tro longa" kaj, krome, ĝi "entenas faktajn kaj volatajn miskomprenojn" (kia lingvo!). Alivorte, cenzurado de la vero, konforme al la nuna sistemo. Ni publikigas tiun "longan" cenzuritan leteron en la rubriko "Kion vi ne legos aliloke".

—o(o)—

La maleblecon prezenti faktojn, dementantajn la oficialajn asertojn en la nuna UEA (eĉ por ne paroli pri kontraŭaj opinioj), pritraktas letero de P. Bo Larsen, publikigita sur p. 94 de n-ro 5/1976 de la dana EĤO. Li asertas, ke "natura formo de kreado de opinioj — almenaŭ en nia parto de la mondo — estas diskutoj" kaj plendas, ke "estas neĝuste daŭre ignori la esprimdezirojn de aktivaj membroj". Larsen admonas, ke tio "ne estas bagatelo, sed demando, kiu minacas dispartigon de la internacia Esperanto organizaĵo, kaj tiel forte influas la evoluon de la laboro por la Internacia Lingvo en internacia skalo kaj sekve ankaŭ en Danlando".

J. T.

DONACOJ POR «HORIZONTO»

Gisnuna sumo	2.462 ptoj.
Gesinjoroj Maynar-Pi, Guia de Isora, Hispanujo	300 »
D-ro. A. Albault, Toulouse, Francujo	786 »
F-ino G. Lemonnier, Vanves, Francujo	131 »
Anonimulo, Francujo	1.310 »
S-ino J. Oehri, Strasbourg, Francujo	393 »
S-ro M. Crochet, Epernay, Francujo	131 »
S-ino C. M.-P. Minnaja, Roma	786 »
	6.299 »

Zaragoza, 1976
Inés Gastón

GARANTIA FONDAĴO

Gisnuna sumo	6.919 D.Kr.
Klaus Perko, Graz, Aŭstrujo	500 »
Jean Thierry, Parizo	135 »
Ivo Lapenna, Londono	135 »
Günther Becker, Blieskastel, Germanujo	135 »
Anonime	135 »
	7.959 »

ABONO AL "HORIZONTO"

Jen nia lasta numero por la jaro 1976-a. Nia deziro estis kaj restas ke la revuo estu plaĉa al vi. Vian jarkotizon por 1977, vi povas pagi rekte al la Administracio (500 pesetoj) aŭ al niaj perantoj laŭ la listo, kiu aperas en ĉi tiu numero. Dankon!



“Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo.”

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

HOMA ANIMO. Despina Patrinu. Broŝurita, 21,5 × 14 cm. 63 paĝoj. Eldonis la aŭtorino. Prezo ne indikita.

“Homa animo” estas la ĝenerala titolo de kolekto konsistanta el sep plimalpli longaj rakontoj. Kaj kun tiu sama titolo prezentiĝas la unua kiu, laŭ mia aprezo, estas la plej elvokiva kaj bone prilaborita el la tuto. Ĝi enhavas atentindan poezian sentimenton kaj etosan intiman traserĉadon de homaj reagoj.

La ceteraj, ja, ne multe devojiĝas de tiu sama aspekto, priskriba tekniko kaj introspektiva karaktero de la unua. Jen, do, reliefa karakterizo. Ĉiu rakonto disvolviĝas sen perceptebla intrigo, ĉar, ĉirkaŭ simplaj faktoj aŭ ideoj, kreigas mondo de psikaj nuancoj kaj tre privataj konsideroj ĉiuspecaj. Ofte, tio okazas laŭ neklara kaj iom peza stila maniero.

Malgraŭ tio, Despina Patrinu manifestiĝas tre kreipova, spite ke ŝia esperanta lingvaĵo nenecese implikiĝas en sintaksajn araneajojn kaj gramatikajn erarojn. La teksto, evidente, ne fluas tute nature kaj spontanee; kaj ĝi skuiĝas pro oftaj stumbloj.

Krome, diversfoje oni devas cerbumadi (pro tio antaŭe dirite) intencante diveni la ĝustan signifon de kelkaj pozicioj kiuj prezentiĝas neklare; se ne, restas konfuziĝo. Kaj ankaŭ estas bedaŭro ke de la unua ĝis la lasta paĝo

— el tiuj sesdek-unu de la rakontaro — konstante, insiste, defie, aperadas plej variaj preseraroj kaj gramatikaj misoj, kvazaŭ sub devizo de malestimo pri deviga komposta zorgado kaj pri digno de esperanta teksto.

Jen verko kiu estus povinta aperi laŭ veraj pozitivaj valoroj.

G. Mora

ESEO PRI IDO. Tazio Carlevaro. 5-a kajero de la kolekto *STUDOJ*. Eldonis: Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-Fonds (Svisio), 15 × 21 cm. 50 paĝoj. Prezo: 4,50 fr. sv.

Tiu verketo temas pri studaĵo originale verkita en Esperanto. Ĝi dividiĝas en 16 ĉapitrojn. La unua ĉapitro klopodas pravigi la aperon de tia eseo. La sekvaj ĉapitroj pritraktas ekskluzive lingvajn temojn; inter aliaj, ampleksan (kaj unikan) fonologian analizon de Ido kun akurata komparo kun Esperanto. Poste sekvas formala analizo de la lingvo.

—oOo—

En N.º 79 —Aŭgusto-septembro 1976— de la *Monata Cirkulero de KCE* aperas artikolo de D-ro Fabrizio A. Pennacchietti, *ESPERANTAJ PREPOZICIOJ: STUDIO PRI ILIA FUNKCIECA KLASIFIKO*, kun enkonduko noto de Tazio Carlevaro.

Pro la intereso de la temo kaj la klareco per kiu ĝi estas prezentita mi rekomendas sian studadon al ĉiuj, kiuj deziras bone uzi la lingvon.

K L A R I G O

Sur paĝo 109 de n.º 5 de “*Horizonto*” aperis biografia noteto pri la poeto kaj filozofa Joaquim Maria Bartrina.

En ĝi erare aperis la dato de lia naskiĝo, efektive, li naskiĝis la 26-an de aprilo, j. 1850. Ni petas pardonon de niaj legantoj.

3-A INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Humblebæk, Danlando, 23-30 julio 1977

Korespondadreso: cand. oecon. H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danlando

Oficiala Informilo, n.º 2

1. *Prelegoj.* Kiel informite en *Oficiala Informilo, n-ro 1*, la ĉeftemo de la konferenco estos *La lingva problemo en la nuntempo kun aparta konsidero al la bezonoj en Eŭropo*. La prelegoj ankoraŭ ne estas detale fiksitaj, sed ni povas informi, ke siajn konsentojn pri prelegoj donis ĝis nun prof. *Ivo Lapenna*, Londono, prof. *Felix Hörburger*, Ratisbono, kaj doc., s-ino *Birthe Trærup*, Kopenhago. Jam tiuj nomoj garantias pri la kvalito de la prelegaro.

2. *Ceteraj programeroj.* La konferencanoj estas invitataj ne nur al pasiva aŭskultado de prelegoj, sed ankaŭ al aktiva partopreno en diskutado en laborgrupoj pri la temoj de la prelegoj kaj pri aliaj demandoj. Pri tio kaj aliaj programeroj (i.a. ĝeneralaj kunvenoj, distraĵoj kaj ekskursoj) vidu la unuan *Oficialan Informilon* en la antaŭa numero de *Horizonto*.

3. *Konferencejo.* La ideala kadro de la konferenco estos la *Altlernejo Krogerup*, pri kiu informis la artikolo en *Horizonto*, n-ro 5, p. 116.

4. *Kotizoj.* Bonvolu atenti, ke la konferencaj kotizoj altiĝos post la 31-a de decembro 1976. Jen ripeto de la kompleta kotiza tabelo:

	Ĝis 31/12 1976	Ĝis 31/3 1977	Post 31/3 1977
Konferencan(in)o	100 dkr.	130 dkr.	150 dkr.
Geedza paro	160 dkr.	180 dkr.	200 dkr.
Junul(in)o 15-25-jara	60 dkr.	80 dkr.	100 dkr.
Junul(in)o malpli ol 15-jara	senpage	senpage	senpage

5. *Loĝigo.* Informoj pri loĝado en la altlernejo troviĝas en la *Aliĝilo* aldonita al tiu ĉi numero de *Horizonto*. Ni denove atentigas, ke la nombro de unulitaj ĉambroj estas limigita. Se oni deziras loĝi en tia ĉambro, frua rezervado estas konsilinda. Aparta cirkulero-mendilo pri loĝado ekster la altlernejo estos sendita al aliĝintaj konferencanoj, kiuj ne samtempe mendis ĉambron en la altlernejo.

6. *Aliĝo.* Instrukcioj pri aliĝo al la konferenco troviĝas en la menciita aliĝilo. Pliajn ekzemplerojn de tiu oni povas peti per poŝtkarto al la supra korespondadreso.

Bonvenon al la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado daŭriganta la tradiciojn de la zamenhofa esperantismo — humaneca internaciismo!